




GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.



NUNTEMPAĴOJ : Ventego en Hongkong (ĤINUJO), de Fratoj *Buchanan* (SKOTLANDO). — Revolucio en (RUSUJO), — Stranga Okazaĵo el (INDIO), de *R. F. Vaughan* (INDIO). — Ehoj de Béziers, de *J. Flourens* (FRANCUJO).

ĈIULANDA VIVADO : Internacia enketo pri edukado. — Raporto de Pr^o *Th. Rousseau* laŭ dokumentoj de S^{roj} *Samppa Luoma* (FINNLANDO), *Alois Stepàn* (BOHEMUJO), *Guitteny* (TAHIT). —

DIVERSAĴOJ : La misteraj piloloj de Doktoro Kohol, de *Hans Romanowicz* kun ilustraĵoj de *A. Raschka* (AŬSTRUJO).

FELIETONO : Tertremo, de *Amfiteatrev'* (RUSUJO) kaj *Leo Belmont* (POLUJO).

PRI ESPERANTO : Ĉirkaŭ la kongreso. Letero de la *Trio* — Kroniko kaj Bibliografio. — Letero de (BRAZILUJO).

SCIENCOJ : La transkondukantaj pontoj super la markoletoj, de *Leinekugel le Cocq* (FRANCUJO) kaj *René de Saussure* (SVISUJO).

SPORTOJ : Sporta kroniko, de *L. de Guesnet* (FRANCUJO).

TEATRO : Aferoj teatraj, de *F. Flores Garcia* kaj *A. L. Villanueva* (HISPANUJO).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)
Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al :

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1^a Jaro : 12 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

RIPREZENTANTOJ : Brita Imperio: British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.
Svedujo: S^o P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, kaj EN ĈIUJ FRANCAJ STACIDOMOJ.

Premio al niaj legantoj.



Por esti agrabla por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transport-kosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorlogon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude.

En la du kvalitatoj, la poŝhorlogo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Unua kvalitato: 30 fr. Dua kvalitato: 20 fr.

Ni ne akceptas la respondecon de l' abonaj numeroj de « Tra la Mondo » perditaj de la poŝto. — Ni faras la adressanĝojn NUR laŭ peto AKOMPANATA DE 50 CENTIMOJ.

La manuskriptoj ne estas resendataj.

Oni povas represi niajn artikolojn kiam malpermeso ne estas speciale farita, sed oni estas petata ĈIAM CITI LA DEVENON DE L'ARTIKOLO, t. e. la nomo « Tra la Mondo », kaj sendi al ni ekzempleron de la traduko.

Ni respondas nur al la leteroj akompanataj de la respondeca poŝtmarko.

Redaktora babilado.

La devo de la esperantistoj — Necesegeco por la komercistaj samideanoj. — Tio, kion devas fari la Esperantista gazetaro; tio, kion ĝi devas eviti. —

« Dezirante helpi al la esperantemaj komercistoj, kaj posedi la poŝhorlogon *L'Espero* anoncitan en *Tra la Mondo*, mi estos al vi tre danka se vi bonvolos sendigi al mi unu el tiuj poŝhorloĝoj... »

Tiel komencas leteroj sendita al nia administracio de S^{ro} Lannelongue el Parizo.

Kompreneble tiu deklaro multe donis al ni plezuron, ĉar estas kuraĝige vidi ke, iafoje, oni estas aŭdita. Multaj personoj ĝin proklamas: Esperanto havas grandan signifon por la komerco; kaj, kiam kelkaj komercistoj ne timas provi ĝian taŭgecon kaj riskas suferi la mokaĵojn de siaj kunfratoj kreante markon « Esperanto », la esperantistoj, ĝenerale — anstataŭ aĉeti pli vole tian komercaĵon — agas tute indiferece kontraŭ ĝi.

La rezultato estas facile komprenebla: kiam oni petas al iu el tiuj progresemaj komercistoj « Ĉu vi estas kontenta pro via provo per Esperanto », kaj ke li povas nur respondi « Tute ne, miaj esperoj estas tute trompitaĵoj », la demandinto ne estas, ja, instigata aŭskulti la propagandistojn, kiuj pretendas ke Esperanto estos potence helpo por la internacia komerco.

Do, kiam novaj firmoj montras fidon al Esperanto, estas devo por veraj esperantistoj — almenaŭ provi iliajn komercaĵojn. Se tiuj ĉi ne estas bonaj, la produktantoj povos nur kulpigi sin tial ke la provo ne iĝas uzado, sed almenaŭ ili ne povos diri, ke Esperanto ne altiris al ili esperantistan klientaron.

Kiam firmoj tutmonde konataj kiel Gellé, Suchard, konigas ke ili uzas Esperanton por siaj komercaj rilatoj, estas devo por la samideanoj iĝi iliaj aĉetantoj; kaj la plej fervoraj ne devas ŝanceliĝi skribi al ili por ricevi sciigojn, katalogojn, k. t. p.

Almenaŭ la grupestroj, konsuloj, devus tion fari ĉar la unuaj — por la propagando, la duaj — por plenumi sian celon, devas posedi sciigojn kaj dokumentojn montrablajn pri ĉio interesa por Esperanto.

Tion bone komprenis nia malnova kaj sindona hispana samideano, S^{ro} Codorniu, konsulo en Murcia, kiu la unua mendis poŝhorlogon « Espero ». Li certe uzis ĝin kiel propagandilo, ĉar iom da tempo poste alvenis opa mendo de poŝhorloĝoj kun la vortoj aldonitaj de S^{ro} Codorniu: « La samideanoj multe ŝatis la poŝhorlogon ». Certe estis same pri la aliaj personoj, kiuj mendis tiun *esperantaĵon*, bonegan, beletan, fine facile kaj ofte uzeblan por la propagando; kaj konsciencio ni ĝin rekomendas al ĉiuj.

Mi parolis pri la devo de l' samideanoj rilate la aĉeton de

komercaĵoj je la marko « Esperanto ». Estas, aliflanke, io, kion necesege devas fari la esperantemaj komercistoj se ili volas sukcese: konigi sian firmon, sian markon per la gazetaro; kaj kompreneble, por la komercaĵoj dediĉitaj al ĉiunacia vendado, per la gazetoj tute internaciaj.

Antaŭ kelke da tempo estis kreata marko Esperanta por ŝaŭmanta vino, konkurenco al la jam honorinde konata « Mirinda » de S^{ro} Jadeau. Petita por mendo de anonco, la kreinto respondis, ke, ne esperante sukceson de reklamo, li ne volas ĝin fari. De kio do li esperas sukceson? De cirkuleroj ofte ĵetataj sen legado en la paperujon, kiujn oni ne konservas! Se almenaŭ ili alvenus akurate. Sed tiuj kiuj praktikas la nomarojn de esperantistoj scias, ke neniam estas fidinda pro multaj kaŭzoj sendependaj de la eldonada zorgo. La reklamo per gazetoj trafas certe, kaj *restas*, kiam ĝi estas farita en revuoj konservindaj pro sia intereso kaj beleco.

Jen, cetere, kelkaj citoj el specialistoj por la komerca diskonigado.

« Estas nur vojo por la aferoj: ĝi estas la publikigado.

Estas nur vojo por atingi la diskonigadon: ĝi estas la anonco. »

BLACKWOOD.

« Ne zorgi publikigadi estas sama afero kiel neniam fervoje veturi aŭ neniam telegrafi kaj telefoni. »

HORACE COREELEY.

« Kia ajn bonega estas la formo de anonco kaj kiom ajn granda ĝia persisteco, necesege plue, ke ĝi estas lokita en organon, kiu atingas la publikon.

Estas personoj, kiuj tiel kontraŭparolas: ni vendas kun tiom malmulte da gajno, ke ni ne povas pagi al ni la lukson publikigadi.

Precize pro tio, ili devus uzi anoncojn:

Nur sen profito oni liveras komercaĵojn laŭ kondiĉoj speciale favoraj, se oni ne zorgas ilin konigi al la publiko. »

ADVERTISER'S GAZETTE.

Alia afero malhelpas iaajn komercistojn fari anoncojn en Esperantaj gazetoj.

Oni kutimigis ilin enpresu senpage la komercajn sciigojn kiujn ili sendas, petante tian enpreson *por la propagando!*

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

La Kembraĝa Kongreso.

La *Trio por la Tria* havas la honoron sciigi al la Esperantistaro ke ĉiuj Kongresarangoj bone progresas.

Speciala sendianda restoracio por vegetarianoj, Diservoj por Romkatolikoj kaj Anglaj Ekleziaj estas aranĝitaj inter aliaj aferoj.

La Dekano kaj Captro de Ely afable proponis faciligi por la Kongresanoj viziton al la mondfama katedra preĝejo de tiu urbo, kaj ankaŭ estas preskaŭ certe, ke vizito al la Ĝardena Urbo, ne malproksime de Kembraĝo estos unu el la plej interesaj kelkhoraj ekskursetoj farotaj.

La *Trio* esperas povi anonci la koston de Kongresbiletoj kaj loĝadoj post unu monato, kaj dume petas, ke ĉiuj kiuj intencas veni bonvolos sciigi sian intencon. Ju pli granda la nombro, des pli malgranda la kosto de la bileto. Sed ni jam povas certigi al niaj amikoj ke ili povas « havi fidon » ; la kosto ne estos granda.

Jam poŝtkartoj alvenis el la ĉefaj nacioj de la mondo, kaj estas tute certe ke *La Tria* estos vere grava internacia kunveno kiu devas havi gravan influon je nia estonta progresado.

Ni tre esperas ke ĉiuj Sekretarioj kaj Komitatoj de la diversaj fakoj de la Kongreso, kiel ekzemple, la fako por Ruĝa-Kruco, Matematikistoj, Advokatoj, Framasonoj, k. t. p., bonvolos frue ordigi siajn aferojn, kaj sciigi al ni kiom da kunvenoj ili deziras havi. Ni forte rekomendas al ili ke ili aranĝu la tagordon de la dezirataj kunvenoj kiel eble plej frue.

La Kongreso jam eldonis diversajn propagandilojn, ekzemple muzikajn poŝtkartojn (25 po 1 fr.), verdajn flagojn, teatran ludon ludotan ĉe *La Tria* (10 centimoj), kaj tiel plu, kaj ni esperas ke ĉiuj Esperantistoj kune laboros por disvastigi la konon pri la datoj de la Kongreso inter amikoj.

Por konkludi, La *Trio* deziras kore danki ĉiujn helpantojn, kiuj ĝis nun plifaciligis la organizon penadon, kaj esperas, ke iuj, kiuj havas helppropozojn por sendi ne ŝanceliĝos, sed sendos ilin senpere kaj senprokraste al *La Tria por La Tria*, 13 Arundel Street, Strand, London W. C.

LA TRIO POR LA TRIA.

NIA UNUA JARO.

Restas nur tre malmulte da plenaj kolektoj, kiuj, pro tio, kostas nun 12 fr. anstataŭ 8.

Sed ni havas ankoraŭ sufiĉe da kolektoj sen la 10^a kaj 11^a numeroj. Tiujn ni vendas je la

FAVORA PREZO JE 6 FRANKOJ.

Ili formas ankoraŭ riĉan prozajaron kun belaj ilustraĵoj kaj povus esti donacataj ĉu kiel premio por Esperantaj kursoj, ĉu por la Paska festo.

Ni tre atentigas pri tio niajn amikojn.

FERVOJOJ de PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE

De Paris Orienten (tra Marseille).

La K^{io} P. L. M., konsentinte kun la K^{ioj} Messageries Maritimes, Fraissinet kaj Paquet, liveras biletojn simplajn (irajn), uzeblajn dum 45 tagoj, por veturi, tra Marseille, de Paris ĝis unu ajn el la sekvantaj havenoj: Alexandrie, Beyrouth, Constantinople, Le Pirée, Smyrne, Alexandrie, Jaffa, Port-Saïd, Batoum, Salonique, Odessa, Samsoun, k. t. p.

La oficejoj de la K^{io} Messageries-Maritimes liveras biletojn irajn kaj reirajn uzeblajn 120 tagojn por veturi, tra Marseille, de Paris ĝis Alexandrie, Port-Saïd, Jaffa, Beyrouth.

Haltoj laŭvolaj laŭ la vojaroj P. L. M. (per Bourgogne aŭ Bourbonnais).

Tiuj biletoj donas rajton je senpaga transporto ĝis 30 kg. da pakajoj por ĉiu vojaĝanto sur la vagonaro; sur la ŝipoj, tiu senpago altiĝas ĝis 100 kg. por 1^a klasa loko kaj 60 kg. 2^a klase.

Por pluj sciigoj, legu la Gvidlibron-Horaron P. L. M., aĉeteblan 50 centimojn en la stacidomoj de la K^{io}.

LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO

46, RUE SAINTE ANNE, PARIS

La Katalogoj estas riceveblaj senpage.

Esperantistoj

PASIGU LA SOMERON

EN

AIX-LES-BAINS (FRANCLANDO)

— Sendu 30 centimojn al la —

LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO

kaj vi ricevos afanke la interesan broŝuron de Dr. J. DARDEL, pri la termala kuracado en tiu urbo.

ASP

KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza, Oportuna, Pura, Neestingebla en Ventego, Funkciadas bonege nur kiam oni uzas la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn

120.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn,

kun lenso 5 kronojn,

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn.

SENDOTA ĈIEN DE

O. F. ASP, Kopenhague.

DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

General Agento:

Sro G. RUTTER, 30, Red Lion Squar, LONDON.



Ĉiu esperantisto legos kun plezuro

« la KAPRINO de S^{ro} SEGUIN »

deklamita ĉe l^o Neuchatela esp. festo. — Sendinte 20 centiman p. markon al S^o Yersin Peseux (N^ol) Svis, vi ricevos tiun belan broŝuron. — 12 ekz. po fr. 1.50. Afranko plie. Tre rekomendinda por grupoj kaj kursoj.



Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la
Internacia Sciencia Oficejo Esperantista
Ĝenevo-Svislando.

Kelkaj originalaj artikoloj en la venontaj numeroj:

Al nia Legantaro, antaŭparolo de la nova redakcia komitato, pri la fondiĝo de *Sciencia Asocio Esperantista* dum la dua universala Kongreso, la kreo de *Internacia Sciencia Oficejo* en Ĝenevo kaj la reorganizado de *Internacia Sciencia Revuo*.

Pri surfacoj duaordaj komunfokusaj, de R. Bricard, Parizo (Francujo).
Du vortoj pri terminoj matematikaj kaj aritmetikaj, de W. Śmurlo, Stuttgart (Germanujo).

Pri la uzebleco de la fortoj de l' homo, de André Broca, Parizo (Francujo).

Deveno de la speco ĉe la papilioj, de P. A. H. Muschamp (Anglujo).

Artikoloj pri geodezio, de V. Ŝulgin, Pskov (Rusujo).

Pri la manko de internacia geofizika terminaro, de E. Chaix, Ĝenevo (Svisujo).

La komplikeco pri la deveno de la tertremoj, de Th. Tommasina, Novara (Italujo).

Evolucio de la religia ideo, de Dr^o Vallienne, Parizo (Francujo).

Pri la hidrodinamika teorio de la « Seĉoj » de Prof. Chrystal, Edinburĝ, Skotlando.

Nuna Stato de Internacia Bibliografio, de J. Hanauer, Frankfurt a/M. (Germanujo).

Specimeno senpage laŭ peto.

Jare, 7 frankoj, 6 markoj, 6 ŝilingoj aŭ 2,75 rubloj.
Unu numero: 60 centimoj, 50 pfenigoj, 6 pencej aŭ 25 Kopekoj.

Oni abonas ĉe la Sciencia Oficejo, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & C^{ie}* Parizo (Francujo), « *Review of Reviews* », Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno, (Italujo), *M. Arcl*, Warszawa (Rusujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Høst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

La brazila registaro helpas Esperanton.

La registoj en Brazilujo ne malŝatas nian lingvon. La nuna prezidanto de *Brazila Klubo* estas la tre konata deputito socialista S^{ro} *Medeiros e Albuquerque*, kiu ĉeestis nian duan kongreson, kiu jam de longe bataladas kontraŭ alkoolismo kaj por la socialaj kaŭzoj.

Kiam S^{ro} Everardo Backheuser malfermis sian unuan publikan kurson pri Esperanto, S^{ro} Dr^o Nilo Peçanha, vic-prezidanto de l' Respubliko, kiu estis tiam malsana, sendis tamen sian sekretarion S^{ro} Fontenelle por prezidi la paraladon kaj li mem skribis favoran leteron al la parolinto.

La Ministro de Internaferejoj permesis ankaŭ la malfermon de kurso Esperanta en la oficiala lernejo (Gimnazio Nacia) kaj eĉ ĉeestis la unuan lecionon. La Ministro de Militaferejoj permesis la malfermon de kursoj pri Esperanto en la militista kolegio (donata de S^{ro} Daltro Santos) kaj en la Alta Milita Lernejo (Porto Alegre) donata de S^{ro} Christiano Kramer.

Kiam *Brazila Klubo* intencis fari kurson speciale por la geinstruistoj, ĝia prezidanto sin turnis la direktoron de *Pedagogium*, la gloran nacian poeton S^{ro} Olavo Bilac. Li tuj permesis kaj en la *Oficiala Gazeto* petis (!) la geinstruistojn lerni novan lingvon.

Fine, la Ministro de la Publiklaboroj, laŭ peto de Sinjoro Medeiros e Albuquerque, enmetis Esperanton inter la *klaraj* lingvoj por la telegrafaj transigoj. La telegrafo disigas la lingvojn je klaraj (tio estas de ĉiu konataj) kaj mallklaraj (t. e. kiujn neniu estas devigita koni). En Brazilujo, la unua kategorio enhavas: portugal-franc-angl-german-, ital-, hispanan lingvojn; la dua kategorio, la aliajn. Hodiaŭ, dank'al peto l' prezidanto de *Brazila Klubo* la unua kategorio enhavas ankaŭ nian karan lingvon.

La helpo de la registaro altiris al ni multe da aliĝoj. La privataj kolegioj jam malfermas kursojn pri Esperanto, la ĵurnaloj kaj la burĝaro ekrigardas Esperanton kiel seriozan aferon.

El letero de Brazilujo.

Eldonaĵoj de la Societo « Pacifisto ».

« *Rememoroj pri Solferino* », de Henri Dunant, tradukita de A. Vaillant kaj P. Fructier. 1 fr.

« *Ili estis frenezaj* » de Octave Mirbeau, trad. de Louis Segréinat, kaj « *Ruĝa Rido* » de Leonid Andrejev, trad. de Fjodor Avilov. Unu volumo 1 fr. 50. Ambaŭ ĉe Presa Esperantista Societo, 33 R. Lacépède, Paris.

Eksport=Ĵurnalo.

Internacia Revuo por Komerco, Industrio kaj Jekniko

Abonprezo: M 4. — internacie

Apero: ĉiumonate

Eksport-Ĵurnalo (E-Ĵ) estas la nomo de nova gazeto, kiu en mirinda maniero plifaciligas la internacian interŝanĝon de komercaĵoj kaj industriproduktoj per la uzado de la lingvo *Esperanto*.

Ĝi raportas pri la eksport kaj importaferoj de la diversaj landoj, pri la tutmonda foiro, priskribas novajn ideojn kaj elpensojn el la teknika kaj industria vivo, priparolas la ŝancojn de la komercaj geoficistoj k. t. p. k. t. p.

Ĉiu esperanto abonu E-Ĵ, ĉar

1) Li ricevas ĉiumonate sciigojn, kiuj havas rektan utilon por li,

2) Li havas la plej efikan propagandilon, ĉar li povas montri al ĉiu skeptikulo la praktikan valoron de Esperanto.

Postulu tuj provan numeron skribante la

literojn E-Ĵ kun via plena adreso (tre legeble !)

sur simpla poŝtkarto kaj adreso:

EKSPORT-ĴURNALO

Frankfurt aM Gutleutstrasse, 96.

Esperanto internacia praktikilo.

« **Tutmonda labora societo** ». Amika unuigo de la esperantistaj geoficistoj kaj gelaboristoj. — Sciigoj pri tiu speciale atentinda societo ĉe la sidejo, 186, Rue Michel Bizot, Paris.

« **Internacia koresponda societo en Aŭstrujo-Hungarujo** » — Sciigoj ĉe S^{ro} Wilhelm Heller, (Esperantista konsulejo) Leitmeritz A. E. (*Germana Bohemujo*).

« **Internacia Klubo de l' esperantistoj** ». — Sciigoj ĉe S^{ro} Paul Nollenberg, Berlin N. W. 52 (Germanujo), Lünburgerstr. 30.

S^{ro} Paul Hellriegel, Parlamenta Stenografisto en Stuttgart (Kaserne-str. 20) sciigas nin ankaŭ, pri fondo de « **Internacia koresponda Societo** (I. K. E.) ».

« **Cartophile international Club** ». — Sciigoj ĉe S^{ro} A. Cottet, 7 Rue des Chantiers, Macon (Francujo).

La unuigo germana de fotografistoj en Weimar disendis, angle, france, germane kaj — *Esperante*, al la tutmonda nacia gazetaro, ĉirkaŭleron pri ekspozicio fotografa tutmonda aranĝota en Dresden dum 1910. Bonege. (Laŭ « *Ĝeo Esperantista* »).


« **La organiza komitato de Internacia Ekspozicio stenografia** » en Szeged. (4. Fertő-utea, Hungarujo), sciigas *Esperante* ! pri la ekspozicio, dum kiu oni aranĝos internacian kunsidon de Esperanto-stenografistoj. Ankaŭ bonege.

Laŭ iniciato de S-roj A. Schutkowski kaj Viñert okazos en Allenstein, Prusujo orienta, la « **Unua Esperanta German-Slava Kongreso** », kies plenumo povas nur ekzistadigi bonegajn rilatojn inter la diverslingvaj partoprenintoj.

Bibliografio (Fino).

La klubo de la Kolar Gold Fields preparas vortaron de teknikaj minlaboraj vortoj kaj frazoj, kaj deziras korespondadi por tiu afero kun samideanoj okupataj pri la mina industrio [Adresu ĉion al la Sek. R. F. Vaughan, Marikuppam, Mysore-str, S, India]. *El « B. E. »*

La potenca Societo « Christian Endeavores » enhavanta 70.000 sekciojn kaj ĉirkaŭe 4 milionojn da membroj, voĉdonis favore por Esperanto dum sia kongreso. (*El la « Moniteur du Commerce de Bruxelles »*).



Kopirajto

Fot. Alois Stefan.

GELERNANTOJ EN BOHEMA LERNEJA ĈAMBREGO.

En bohemiaj vilaĝaj lernejoj, ambaŭseksaj infanoj apudeblas en la sama ĉambrego.

Internacia Enketo pri Edukado.

15 LANDOJ PARTOPRENINTAJ.

Kelkaj vortoj pri la kampara infana vivado kaj instruado en Finnlando. — Kiel manĝas la kamparaj lernantoj en Bohemujo. — Malbonaj emoj de la infanoj de Tahiti. — Petoleco de l' infanoj japanaj kaj trakvileco de l' hinaj.

Enketo pri Edukado.

Mi unue devas danki niajn korespondantojn el Finnlando, Bohemujo, Tahiti'o, Usono, Skotlando, Bulgarujo, Japanujo, Polujo, Svisujo, Siberujo, Germanujo, Italujo, Francujo, Rusujo, k. t. p. Kiuj bonvolis sendi al ni dokumentojn por nia enketo. Ĉi tiuj dokumentoj ricevitaj estas pri la plej diversaj temoj edukadaj; nur kelkaj personoj respondis precize mian demandaron, kiu aperis en nia 6^a n^o. Tio min komence iom ĉagrenigis; sed ĉar la temdiverseco de la respondoj liveris al mi multe da interesaj ideoj kaj ŝatindaj informoj, mi nur devas gratuli la respondintojn, ke ili transpasis la barilojn, kiujn mi estis al ili montrinta.

La unuagradaj, aŭ popolaj, lernejoj, pri kiuj mi komence raportos, funkcias en la tuta Eŭropo laŭ planoj, kiuj estas malsimilaj nur pri detaloj. Sufiĉos do priskribi unu el ili. Mi elektas lernejon de la ekstremnorda Finnlando, pro la speciala intereso kiun donas al ĉi tiu lando ĝia kvazaŭ polusa klimato, ĝia proksimeco al potenca Rusujo; kaj por vidigi al niaj legantoj ke tiu malbone konata lando, pro sia zorgado al la publika instruado, per la multeco de siaj lernejoj, estas unu el la plej progresemaj.

Do, jen estas tio, kion skribas nia korespondanto, S^{ro} Samppa Luoma:

Kelkaj vortoj pri la kampara infana vivado kaj lernado en Finnlando.

La finna, finnlingva nacio konsistas el tri miljonoj da homoj, kiuj loĝas sur kamparo kaj en kvardek urbetoj, el kiuj la plej granda estas Helsinko, havanta 116.000 loĝantojn. Sed, mi skribas nur pri kampara infana vivado.

Infanetoj vivadas en sia hejmo ĝis kvin- aŭ ses-jara aĝo. Dum tiu tempo ili lernas de siaj gepatroj iom legi, kalkuli, kaj helpi al ili. Kvin- aŭ ses-jaraj infanoj devas ĉeesti dum kvar aŭ ok semajnoj la prelatan instruon (kiertokoulu) ĉiuvintre. Tiuj ĉi instruoj ordinare havas lokon en vilaĝaj domoj, kaj oni lernas tie katehismon, biblian historion, legadon, kalkuladon, skribadon kaj kantadon de preĝejoj psalmoj. La pastroj zorgas pri la ĝenerala lernado per ĉiuvintraj « legadoj », kien ili kunvokas ĉiujn gepatrojn kun iliaj infanoj, kaj junulojn, por legi kaj klarigi religiajn dogmojn. Ekstemple la infanoj devis esti arestitaj en tiuj ĉi domĉambraj lernejoj tutan tagon, de la naŭa horo matene ĝis la sesa vespere; sed nuntempe oni lernas tie dum kvin aŭ ses horoj ĉiutage. Sed, kiel ĉiuj efektive tion scias, la pastroj tute ne amas ludojn aŭ kantojn, krom preĝejoj psalmojn, kiujn infanoj devas kanti en la diritaj lernejoj.

La infano estas malsaĝa pro feliĉo, kiam ĝi estas plenuminta sian okan aĝaron. Ĝi scias, ke la



Kopirajto

Fot. Samppa Luoma.

EN FINNLANDA LERNEJO.

La milito per neĝaj bomboj.

venonta 15^a de Aŭgusto donos al ĝi la permeson partopreni elementaran kurson en popola lernejo (kansakoulu) dum ses semajnoj. Tie ĝi povos ludi, kanti, ĝoji, kaj la instruisto estos gaja persono, kiu vidigos al ĝi centojn da belegaj bildoj kaj rakontos interesajn historiojn. Kaj, kiam la ses semajnoj estas pasintaj, ĝi malridas dum sia lasta vojaĝo hejmen. « Nu, nu, atendu la venontan aŭtunon » tranviligas ĝia patrino.

Ĉe elementara lernejo oni lernas, duonhore, skribadon, legadon, geografion enlandan, kalkulado, ludojn kaj kantojn dum kvin horoj ĉiutage.

La popola lernado daŭras tridek ses semajnojn ĉiuvintre. Oni lernas dum tridek du aŭ tridek kvar horoj ĉiusemajne: religion (4 h.), kalkulado (5 h.), gepatran lingvon kaj skribadon (7 h.), naturajn sciencojn (9 h.), kalkulado (5 h.), universalan kaj finnan historion (2 h.), universalan geografion (3 h.), muzikon (2 h.), desegnon (1 h. aŭ 2 h.), geometrion (1 h.).

Tiujn popolajn lernejojn devas ĉiuj komunumoj konstrui tiel multe, ke, por kvincent loĝantoj, estu unu instruisto kaj unu lernejo. En grandaj vilaĝoj estas duoblaj lernejoj. Ekzemple, en Nurmijarvi, kiu enhavas dek mil loĝantojn, estas dek kvar lernejoj, el kiuj ses estas duoblaj. Se la vojo surironta de iaj infanoj estas pli longa ol kvin kilometroj, la komunumo devas konstrui por ili novan lernejon, ne kalkulante la loĝantojn.

Infanoj alvenas al lernejo je la naŭa horo matene. Oni kantas, komence, kelkajn strofojn el preĝeja psalmilbro kun orgena akompano de instruisto, ĉiuj klasoj kunestantaj en sama salono, kutime gimnastikĉambrego. Poste, la lernantoj iras en siajn klasĉambrojn, du klasoj kune, sidante duope apud sama pupitro. La laboro sekvas nun, akurate, la leĝan programon, kvin aŭ ses horojn ĉiutage. Instruisto postulas iliajn hejmajn laborojn kaj klarigas novan, uzante helpon de diversaj ilustraj tabuloj, aŭ de fizikaj, hemiaj instrumentoj. Infanoj respondas ĉiam starante.

Post ĉiu leciono estas paŭzo de kvin minutoj, dum kiu la lernantoj povas ludi en korto, libere, kiel ili volas. Ordinaraĵoj en vintro estas konstruado de neĝaj kasteloj, kaj milito per neĝaj « bomboj ». Apudestanta ilustraĵo montras la situacion, kiam neĝa milito estas *deklaraciita*, kaj la superaj klasoj atendas atakon de la malsuperaj; multfoje devas la instruisto interiri por paco. La dua ilustraĵo montras tiun situacion.

Unu libertagon oni donas kutime ĉiunonate; je kristnaska festo, la libertempo daŭras tri semajnojn, je Pasko unu. Aŭtune kaj printempe, la lernantoj faras multe da ekskursoj en arbarojn, por botaniko kaj aliaj celoj. Dume, ili estas gardataj de instruisto.

De la dekdua ĝis la unua horo estas manĝotempo. Tiam la infanoj iras ĉiuj hejmen, krom la longvojoj, kiuj manĝas, en la gimnastika ĉambrego, sian el hejmo alportitan nutraĵon: unu botelon da lakto, bovoviandon, buteron kaj panon.

La popola kurso estas kvarjara, de la naŭa aĝjara ĝis la dektria, sed multe da infanoj estas en sama klaso dum du jaroj. Kiam tiu kurso estas plenumita, estas ankaŭ finita la trudita edukado, escepte la religia, pri kiu ni jam parolis, kaj kiu daŭras dum la tuta vivo, per ĉiujaraj kunvenoj (kinkerit).

Mi ne parolis pri aliaj, tre multnombraj, edukejoj, ĉar ili estas liberaj. Per lokalaj gazetoj, kiuj alvenas en ĉiun familion, oni plenigas sian konon pri la vivo publika.

Tre vere nia popolo iras rapide antaŭen apud aliaj popoloj. Multe estas farita, sed pli multe ankaŭ farota; ni tion sciu, kaj ni ne povos malaperi el la mondo, kvankam ni estas malgrandaj, kaj inter grandaj nacioj. Nian lingvon ni havas, kaj nian « propran » kulturon, de tiom longe, kiom unu persono finna vivadas sur la tero. »



Kopirajto

EN FINNLANDA LERNEJO

Fot. Samppa Luoma.

La milito per neĝaj bomboj. — Post la repaĉiĝo.

Rimarkinde estas ke, en Finnlando, estas fizikaj kaj hemiaj instrumentoj eĉ en unuagradaj lernejoj. Oni devas konfesi ke, en la plej grandaj nacioj, ekz. en Francujo, en ĉi tiuj lernejoj, fiziko kaj hemio estas ĝenerale instruataj nur per libroj...

S^{ro} Samppa Lu-
oma diris al ni
la ordinaran nu-
traĵon de la fin-
naj infanoj. Ĉu vi
nun deziras scii,
kion manĝas en
sia hejmo la ge-
lernantoj de S^{ro}
Guitteny, instru-
isto en Borabora,
(insularo Tahiti)?
« Unue, ili ne
manĝas ĉe tablo,
kiel eble vi kred-
as, sed tere; kaj
anstataŭ bovo-
viandon, lakton
kaj buteron, ili
havas fiŝon, bananojn, mangojn, kaj panarbon (*uru*,
en enlanda lingvo). »



FAMILIA TAGMANĜO EN TAHITI

Siaflanke, nia kunlaboranto Alois Stepàn donas al ni interesajn sciigojn pri la maniero, laŭ kiu estas nutrataj la lernantoj de la kamparaj instruejoj en Bohemujo.

En la tagmezo, de la 12^a ĝis la 1^a horo, iras la lokaj lernantoj hejmen por tagmanĝi. Ilia tagmanĝo konsistas el supo, poste viando kun la saŭco kaj terpomoj aŭ buloj, aŭ kiu ajn apudmanĝo. En la fasta tago oni tagmanĝas supon kaj bakitan farunmanĝon, aŭ kaĉon el rizo, ovojn aŭ kion ajn sen viando. En la dimanĉo oni tagmanĝas supon, bovoviandon kun saŭco kaj ankoraŭ ian viandbakajojn diverse preparitan. Ŝatata manĝo ankaŭ buloj kun braziko. La malriĉaj ne alkonformiĝas tiun ĉi vicon, sed ili manĝas, kion ajn ili havas. Lernantoj, kiuj venadas el ĉirkaŭaj vilaĝoj en lernejon, havas nur en tagmezo panon, kiun kun si en la lernejon ili alportadas.

En multaj komunumoj fondas bonfarantaj homoj, por malriĉaj lernantoj, supajn klubojn. Tiuj ĉi kluboj estas subtenataj de lokaj riĉuloj aŭ de landaj ofic-

oj. Oni organizas ankaŭ kolektad-
ojn aŭ teatrajn
ludojn aŭ aliajn
amuzadojn por
la profito de tiuj
ĉi kluboj. Kluboj
kuiras kaj dis-
donas en vintraj
monatoj al mal-
riĉaj lernantoj,
en la tagmezo,
supon, por ke ili
almenaŭ ion var-
man havu en la
stomako.

La tagmanĝo
estas ĉefa man-
ĝo. La maten-

manĝo kaj vespermanĝo estas malpli gravaj. La matenmanĝo estas ordinare kafo kun lakto, nomita blanka kafo, al kiu oni aldonas panon aŭ alian farunbakajojn. Vespere oni manĝas ion ajn: panon kun butero aŭ viandfumajojn, farunbakajojn, ovojn, terpomojn, ŝatatan manĝon de malriĉaj, ankaŭ supon; la riĉaj manĝas viandon diverse preparitan, k. t. p.

Nia finna korespondanto sciigas al ni, ke la instruisto en sia lando devas ofte interiri por pacigi la ludantajn infanojn. Sed la rolo de S^{ro} Guitteny estas ja multe pli delikata kaj malagrabra, ĉar, li skribas, ke « li devas ĉiam batali kontraŭ bedaŭrindaj moroj de la infanoj, subtenataj, pri tiuj ĉi moroj, de siaj propraj gepatroj! »

En Hinujo, male, diras D^{ro} M. P. G., estas tre facile disciplinigi la infanojn. « Ili estas ĝenerale tre obeemaj: ĉar la petoleco estas malbono (kiom malgranda!) preskaŭ nekonata ĉe la Ĥinoj, dum iliaj flavaj fratoj el Japanlando kaj Annamlando estas sufiĉe provizitaj je ĝi. »

(Daŭranta).

TH. ROUSSEAU.
T. RUSO.



Kelkaj rimarkoj pri la artikolo « Kristnasko ĉe la Bohemoj » de Frant. K. Svaĉina.

Sinjoro Svaĉina spritplene priskribas popolajn kutimojn dum la kristnasko en regno Bohemujo (1). Sed li forgesas, ke la fremdulo, kiu tralegos la artikolon *havas malĝustan ideon* pri la bohema nacio, precipe kiam li tralegos la frazon « manĝi viandon estas tute malpermesita krom tiŝoj ». En kia lando, en kia jarcento vivas, tiuj Bohemoj — li pensos — ke ĉe ili ankoraŭ nun estas ordonata, (kompreneble per leĝoj), kiam ili havas permeson manĝi viandon? Eble ĉe ili estas ankaŭ ordonitaj, longaj aŭ mallongaj haroj, lipharoj, rinkaĵoj, k. t. p.? Ne timu, miaj karaj legantoj! Ne maltrankviligu eĉ per jenaj vortoj « Vespere ĉiuj familianoj preĝas la rozarion, kaj la mastro laŭte antaŭpreĝas. » Tiuj homoj vivas — kaj tio estas granda feliĉo — nur en kelkaj submontaraj vilaĝoj, kie la loĝantaro ĝis hodiaŭ estas tre pia kaj obema al la pastroj. En tia regiono loĝas sinjoro Svaĉina, kiŭ bone konas ĉiujn naciajn kutimojn en sia regiono, sed li forgesis diri antaŭe, ke li priskribas nur, kutimojn de kelkaj homoj ne de la tuta nacio. Ĉar, kiel ĉie, eĉ ĉe ni, la grandurbanaj kutimoj estas tute diversaj de la kamparaj. Kaj tiu rozario ne estas danĝera, kiel laŭ la senco de la citita frazo oni povus opini. Nun

estas en regno Bohemujo grava, forta kontraŭ eklezia movado. Preskaŭ ĉiuj kleruloj estas ĝiaj partoprenantoj. La vortoj esprimitaj antaŭ 50 jaroj de la plej bona ĵurnalisto Karel Havlíček Borovský pri la pastroj: « Nenion donu al ili, nenion kredu al ili » nun estas praktikataj. Le plej granda parto de Bohemoj (precipe la lasta generacio) estas romaj katolikoj nur laŭ baptoregistroj. Alie ili havas la samajn konvinkojn kiel ĉiuj modernaj homoj (Francoj, Angloj, k. t. p.) La priskribo de sinjoro Svaĉina, *koncernis nur kelkajn kutimojn*, kiuj ĝis nun inter la maljunaj vilaĝanoj estis konservitaj. Cetere eĉ tiuj pure religiaj kutimoj ĉiam pli multe malaperas, kvankam la pastroj zorgas pri ilia konservado. Malaperas religiaj kutimoj, malaperas rozarioj; kaj anstataŭ ili, novaj, de kleraj homoj indaj, kutimoj kaj penadoj disvas-
tigas. Ne timu, tute ne timu, fremda leganto, la civilizacio paŝas en Bohemujo same rapide, kiel en via patrujo.

VACLAV RIEGEL,
Esperanta konsulo en Praha.

(1) *Novembra Numero (1906).*

Kroniko kaj Bibliografio.

Dr^o Emile Javal. — Inter Blinduloj, de Dr^o E. Javal kaj S^{ino} Jean Javal. — La internacia kongreso de blinduloj en Cambridge. — Blinda Rozo de Hendrik Conscience kaj S^{ino} Van Melckebeke. — Diversaj eldonaĵoj.

Pleje bedaŭrindan perdon ĵus faris la mondo scienca kaj la esperantistaro en la persono de Dr^o Emile Javal. Eks-deputito, fama okulkuracisto, Dr^o Javal subite blindiĝis ĉirkaŭ la sesdek-dua jaro. Dank' al energia karaktero, li rezistis al la senkuragiĝo tute komprenebla post tia bato kaj daŭris interesiĝi pri la medicinaj aferoj; ofte oni povis lin vidi alvenantan ĝis la pordo de la Medicina Akademio sur tandem-triciklo, kies antaŭa loko estis okupata de fidela servisto.

Sed, precipe, Dr^o Javal penadis esti utila al siaj kunmalfeliĉuloj; kaj « Entre aveugles », kies tradukon ĵus donis al ni S^{ino} Jean Javal, lia bofilino, sub la nomo « Inter Blinduloj », estas la frukto de lia sperto kaj de liaj multenombraj pripensadoj. (2 fr. 25 c. afr., ĉe Hachette & C^{ie} aŭ ĉe T. I. M.).

La blinduloj trovas en ĝi multajn informojn, kiuj tre utilas por faciligi ilian malfeliĉon; kaj iliaj ĉirkaŭantoj aŭ amikoj lernos, kiamaniere ili devos agi por helpi al ili kiel eble plej frate kaj efike.

Ĉiuj vidantoj legos kun kortuŝeco la spertojn, kiel blindulo, de viro kiu dum multjara praktikado, kiel okulkuracisto, savis la vidon de centoj da personoj, kaj poste falis mem, ho ve! en la nigran profundegajon.

La aŭtoro pritraktis ĉiujn temojn interesajn por la blinduloj: dependeco kaj libereco, okupoj ĉiuspecaj, higieno, eksteraj kaj hejmaĵaj interrilatoj, korespondo kun vidantoj kaj blinduloj, muziko, k. c., psikologio de la blindulo.

Kaj ĉiuj ĉapitroj, sen escepto, estas ankaŭ pleje interesaj por la gevidantoj. Oni trovas en ĝi sennombrajn observojn faritajn de l' aŭtoro mem aŭ senditajn de blinduloj ĉiunaciaj, kaj tiu libro tuj ekaperigas la intereson kaj utilecon de Esperanto por la malfeliĉuloj senigitaj de la vidado.

Cetere, kvankam leganta facile france, germane, angle kaj itale; sufiĉe ankaŭ hispane, portugale kaj holande; malgraŭ antaŭaj grekaj kaj latinaj konoj, Dr^o Javal estis senarmigata kiam li provis legi fremdan relieŝan presitaĵon, en kiu oni uzis mallongigarton. En la ĉapitro 23^a, kie li pritraktas la temon « Esperanto », Dr^o Javal aldonas, ke la mallongigoj prezentas tiom da malfacilaĵoj, ke S^{ro} Monnier, sekio de la internacia societo de blindaj lernantoj, estis devigata peti siajn korespondantojn, ke ili forlasu la mallongigojn, aŭ skribu Esperante.

Ni jam parolis pri la utileco de nia lingvo por la presado de verkoj utiligeblaj de ĉiulandaj blinduloj.

Pri tio ni konas la penadojn de la sindona amiko de la esperantistaj blinduloj, S^{ro} Th. Cart, kiu kreis libraron presitan per la Sistemo Braille alkonformigita por blinduloj, kaj kiu, de 1904, elirigas regule, ĉiumonate krom aŭguste kaj septembre, la jam tre konatan Esperantan revuon por blinduloj « Esperanta Ligilo ».

La momento venis por helpi energie al la progresoj de Esperanto ĉe la blinduloj: Oni intencas, dum la ĝenerala Kembriĝa kongreso, organizi kongreson de esperantistaj blinduloj, kiuj nepre devos paroli nur Esperante dum la tuta kongreso.

El Anglujo, Danujo, Germanujo, Francujo, Svedujo, venos espereble 8 ĝis 10 blinduloj, po ĉiu lando; el aliaj landoj 3 aŭ 4; kaj oni povas kalkuli, ke la blinduloj estos verŝajne 40 aŭ 50.

Por tio, kompreneble, oni bezonas monon, kiu pagos la vojaĝelspezojn necesajn.

Oni ne kredu, ke la afero interesas nur la blindulojn: por nia afero mem, la disvastigado de Esperanto inter ili havas grandan utilon; kaj precipe la projektita kongreso. Ĝi certe altiros multe la atenton, ĉar eĉ la plej vantuloj ne restas indiferentaj pri tio, kio koncernas la blindulojn, kaj neniu, post la kongreso de tiuj ĉi, povos dubi pri la facileco kaj taŭgeco de nia lingvo por *difinila kaj utila celo*.

Al ĉiuj do, malriĉaj kiel riĉaj, ni petas monhelpon por la Kongreso de la blindaj esperantistoj.

Jen kiel, laŭ ni, oni povos, sukcese, aranĝi la monferadon, kaj ni petas niajn amikojn pripensi la aferon.

Ĉiu grupo kolektu monon dum la grupaj kunvenoj. Aliparte, ĝi presigu artikolojn en la ĵurnalojn favorajn, kiujn ĝi disponas, klarigante la temon: « Esperanto kaj blinduloj » konigante la kongreson projektitan, fine malfermante monferon inter ĉiuj personoj — kompreneble esperantistaj kaj neesperantistaj — kiuj interesiĝas al la blinduloj.

Por plenaj sciigoj petu la raporton pri « Esperanto inter blinduloj » de Th. Cart, al *Centra Esperantista Oficejo*, 51, Rue de Clichy, Paris, France.

Ĝenerale la ĵurnaloj ŝatas sufiĉe tiajn alvokojn al la bonkoreco de la legantoj, kies donacojn ili konigas en siaj kolonoj.

La grupaj komitatoj sendus al ni la monsumojn, kiujn ni transdonos al S^{ro} Cart, enpresante en « Tra la Mondo » opajn valorojn, kaj, aparte, la sumojn ricevitajn senpere. Tiel la penadoj de la grupoj por ricevi monoferojn estus konigitaj detale en la urboj kaj regionoj interesataj, resume en « Tra la Mondo » t. e. en la tuta mondo. Ni estas certaj, ke tio instigos laŭdindan superemon, kiu efike helpos la organizan komitaton de la Kembriĝa kongreso, kaj la tiel subtenindajn penadojn de nia Sindona amiko Th. Cart.

Ni malfermas la monoferon, enskribante:

S^{ro} Montrosier (Francujo) 5 fr.

S^{ro} Warden (Edinburgh, Skotlando) 5 fr.

S^{ro} Letenneur (Parizo, Francujo) 5 fr.

Eldonoj de la firmo A.-J. Witteryck, Bruges:

Nia amiko Witteryck ĵus eldonis la jenajn verkojn, kies eldonado meritas la samajn laŭdojn kiel « Tra la Mondo », pro la zorgo laŭ kiu ili estas presitaj:

« Blinda Rozo », traduko de la fama konata « Blinde Roza » de la glora flandra prozisto Hendrik Conscience. La legintoj de la tre interesa verko de niaj lertaj samideanoj Dr^o M. Seynaeve kaj R. Melckebeke, « Paĝoj el la Flandra literaturo », konas jam tiun verkiston, kies verkoj konservas ankoraŭ ravan ĉarmon de juneco, freŝeco kaj sincera kortuŝeco. Ni ne povas pli bone fari ol citi la jenajn liniojn de la unua, kiu, kompreneble, estas la plej taŭga por analizi verkon de sia sampatrujano. « Ekster ĉia malfacila serĉado de afekta sentado, la verkoj de H. Conscience celas al ĝusta pentrado de ĉiaj homaj doloroj kaj ĝojoj, de ĉiaj pasioj kaj kormovoj: tial ili estas vere naturaj kaj, ĉar ili perfekte enpenetras en la reala ĉiutaga vivado kun ĝiaj senhaltaj ridoj kaj larmoj, laboroj kaj plezuroj, tial ili ankoraŭ plejmulte estas ŝatataj de la flandra popolo. Ho, certe, tre malproksime ili staras for de la nuna malkvieta, bruanta speco de literaturo: sed kiel ĉi tiu prave konvenas por iom distriĝi nian lacan, laboregantan kaj spiregantan altrungularon, tiel ankaŭ la verkoj de Conscience, tiom multe sinceraj, naturaj, homaj, ankoraŭ plaĉas kaj tre longe plaĉos al la hom amaso, kiu sincere ridas kaj ploras, amas kaj laboras, kiu sincere vivas: al la popolo.

Kaj tial ankaŭ, dum la tempo rapide forgesos tiom da nunaj gloraj verkistoj, ĝi nedifektite konservos la laboron de tiuj kiuj, same kiel Conscience, sincere priskribis la veran vivadon de sia epoko. Dr^o Seynaeve — *El Belga Sonorilo*.

« Blinda Rozo » posedas ege la kvalitojn tiel bone ĵus montritajn. Ĝi enhavas ravajn scenojn, plej kortuŝajn, kies arkaismo ripozas kaj allogas.

La traduko, verkita de fervora esperantistino, la patrino de nia amiko R. Melckebeke, bedaŭrinde trafita antaŭ ne longe de la kruela morto, estas tute rekomendinda.

La verko, eldonita kun pia zorgo, estas plibeligita de desegnaĵoj faritaj de la Flandra pentristo Edward Dujardin (1817-1889) profesore ĉe la leĝa Belarta Akademio de Antverpeno.

Fidela amiko de Hendrik Conscience. li ilustris la unuan eldonon de preskaŭ ĉiuj liaj verkoj.

La nova volumo estas do monumonte starigita por la gloro de la Flandraj literaturo kaj arto (1 fr. 25. afr.).

« Kelkaj floroj Esperantaj », estas aro de spritaĵoj, amuzaj rakontetoj kun multaj plaĉaj desegnaĵoj. Jam aperis 3 volumoj, kiuj bonege taŭgas por la instruado de Esperanto per bildaro. La prezo malalta de ĉiu volumo faciligas la alprenon de tiuj broŝuretoj por la kursoj: 25 c. afr.

« Companion of the English Esperantist, de A.-J. Witteryck ». Aro da frazoj el la ĉiutaga vivado en la angla lingvo kun Esperanta traduko, kaj mallonga klarigo pri la Esperanta lingvo.

Tre oportuna poŝlibro por Angloj, elegante bindita per verda tuko; taŭgas ne nur por instrui Esperanton al Angloj, sed ankaŭ la anglan lingvon al Esperantistoj: 55 c. afr.

STELETO.

Sekvo sur la kovrilo.

Terura ventego en Hongkong.

Okazis antaŭ kelke da tempo terura ventego en Hongkong S^o Edgar W. Buchanan, brita ŝipoficiro en Hongkong afable sendis al ni, per sia frato G. Douglas Buchanan el Glasgow, 9 tre interesajn fotografajn faritajn post la kataklismo — kiu multe suferigis la urbon kaj la havenon — kun priskribo speciale verkita por « Tra la Mondo ».

Jen eliraĵo de la traduko farita por niaj legantoj de nia amiko G. D. Buchanan kaj 3 el la plej impresigaj vidaĵoj.


« La vaporŝipo *Petrarch*, same kiel la plimulto el la aliaj vaporŝipoj, estis surprizita de la Ventego.

La germana vaporŝipo *Emma Lukyen* faris kolizion kontraŭ la *Petrarch* dum la blovado kaj la du ŝipoj baraktis martelume tridek minutojn unu kontraŭ la alia antaŭ ol la ŝipanoj povis apartigi ilin. Post kiam enfine la vaporŝipoj apartiĝis, la postaĵo de la *Petrarch* frapis fortege kontraŭ kuriera vaporŝipo *Monteagle*, apartenanta al la fervojo Canadian Pacific, kaj ricevis la difektaĵon montritan en la unua ilustraĵo. Teruraj ondegoj pelataj de la furioza ventego forportis ŝarĝboategon (Lighter en la angla lingvo) supren, trans la randon de la kajo (Praya), ĝis kie ĝi vidigas en la fotografajo.

En la unua vidaĵo, la truego en la postaĵo de la *Petrarch* farita de la *Monteagle*, estas tre klare videbla. Rigardante la virinon (rimarku la finan kostumon!) kiu marŝas sur la amasigita flosanta derompaĵo, oni povas iel imagi la staton de la haveno. La ŝarĝboatego (Lighter) tiel severe premegita apartenas, laŭ nia scio, al la konata ŝipa kompanio «P. & O.» Antaŭ la uragano (Typhoon), oni povis luj tian ŝarĝboategojn po dek dolaroj por unu tago. La dolaro valoras tri frankojn proksimume. Nun, kvindek dolaroj estas postulataj.... kaj pagataj.... sed la ŝipaj kompanioj komencas venigi aliajn ŝarĝboategojn de apudaj havenoj por eviti tian tropagon.

2a Fot. — Arbo kaj domo detruitaj en Macdonald Road kiu troviĝas post vico de altaj tenejoj (Godowns) kiuj ŝirmas ĝin kontraŭ la vento. Tamen, eĉ tie ĉi, la difektaĵo estas terura. La sinjoro en blanka vestaĵo estas S^o Latta, fervora samideano.

3a Fot. — Tiu ĉi fotografajo sufiĉe bone figuras la grandegan povon akireblan de akvo pelata de uragano. La stato de la solida masonaĵo de la kajo kaj la situacio de la ŝalupo



Fot. E. W. Buchanan.

Kopiraĵo.

VENTEGO EN HONGKONG.

(sloop) *Phoenix* de la angla militŝiparo atestas pri la forto de la Ventego.

**

Ofte oni plendis al ni pri la neebleco aĉeti nian gazeton kie ajn.

De nun « Tra la Mondo » estas aĉetebla en ĉiuj francaj stacidomoj. Kompreneble, antaŭ ol la afero estos plene konata, ni ne vendos multe da ekzempleroj, kaj tio estos grava ofero de ni por nur kelkaj, kiuj ĝin profitos. Ni do petas niajn amikojn, ke ili diskonigu tiun sciigon kiel eble plej multe, speciale dum la grupaj kursoj kaj kunvenoj.

**



Fot. E. W. Buchanan.

Kopiraĵo.

VENTEGO EN HONGKONG.

Vojaĝanto kaj liaj monosaketoj.
Stranga okazaĵo el Indio.


Indio, ja estas lando de strangaĵoj!

Jen, vera montrado de tio ĉi; okazo raportita, kiel veraĵo, de multaj ĵurnaloj, el unu de kiuj mi ĝin elĉerpis.

Vesperon, vojaĝanto — komercisto iome prospera — vojirante sur la Granda Trunka Vojo*, pro raportoj pri ŝtelistoj antaŭe, ektimiĝis, kaj petis al suboficiro ĉe malgranda policodomo, ĉu li tie povus havigi loĝejon dum la nokto; kaj li volis doni al tiu du saketojn da mono, por ilin gardi sendangere.

La suboficiro ne konsentis tiun ĉi proponon, sed konsilis al li, ke li dormu en la korto, kaŝante la saketojn sub la kapo, kaj pruntedonis liton. Plue, li diris, ke tiu loko efektive estos sendangera, ĉar policano proksime gardos dum la tuta nokto, kaj la timema komercisto pro tio gajniĝis kaj agis kiel proponis al li la suboficiro. Sed la vidaĵo de la mono tiel avarigis la policanojn, ke ili, pensante ke dormegas ilia gasto, ekpriparoladetiĝis ĉu estus eble mortigi lin kaj kapti lian monon, kaj ordoninte al la aliaj, ke ili fosu profundan tombon en kvieto loko malproksima, la suboficiro foriris en la vilaĝon.

Sed jam ne dormis la vojaĝanto, kaj aŭdinte tion, « Kia malfeliĉa stato la mia » li pensis, « tie ĉi policanoj, aliflanke neoficialaj rabistoj ». Tamen post kiam la policanoj ekdormis, li kviete forrampis kun siaj saketoj kaj suprenrampis en la dikan branĉaron de proksima arbedo.



Fot. E. W. Buchanan.

Kopiraĵo.

VENTEGO EN HONGKONG.



S^o D. O. S. LOWELL, EL BOSTON.
Pr^o en Roxbury Latin School.
 (Vidu la artikolon: Esperanto ĉe la Junularo).

Post tri, kvar horoj, revenas la oficiro, kaj eble iom ebrieta, eble iom dormema, tute forgesinte la aferon de la forrampinta vojaĝanto, li kuŝiĝas, kaj baldaŭ dormegas, sed sur la neokupata lito de la vojaĝanto!

Pli poste, vekigas la aliaj policanoj, kaj silente kunvenas, pretaj por sia malbona tasko!

Sed kie estas la suboficiro?

Sur la lito kuŝas la senmova korpo de la suferonto, efektive kovrata per tuk-aĵo; la tranĉilego estas preta kaj akra, sed la eltrovinto de la plano ne ĉeestas! Longe atendinte lin, ili decidis ne atendi pli longe, kaj rapide kaj silente estas plenumata la malvirta ago.

Nur, kiam ili ekeltrovis ke la monosaketoj mankis, tiam ili komprenis tion, kio okazis!

Sed ne estas eble korektigi la eraron, ĉar la kapo de la senpripensa suboficiro estas jam fortranĉita!

Sendube ili nur povas meti en la pretigitan tombon la korpon de la malbonŝanca oficiro anstataŭ tiu de la bonŝanca vojaĝanto!

Tion ĉi ili faris.

Matene, fortune alvenis brita oficiro, veturante al alia loko: al li elvokis la komercisto, ankoraŭ kaŝata en sia arbo, kaj aŭdinte la okazon, tiu ĉi oficiro demandis pri la tuta afero, kaj, tuj poste, la malbonaj kaj tro rapidaj policanoj sin trovis — malliberuloj! Krom en Oriento, kie povas okazi tia stranga okazaĵo!



GENERALO PAULOW.

Juste oni devas plie diri, ke la ĵurnaloj, kiuj unue enpresis tiun ĉi rakonton, poste sciigis ke ĝi estas « Kanardo »; — tre malnova fabelo, portanta novan vestaĵon.

De RUPERT F. VAUGHAN,
 Marikuppam, Mysore State, S. India

* « La Granda Trunka Vojo » estas la plej grava vojego de Indio, kuŝanta de la ĉefurbo (Calcutta) al la Panĵaba provinco.



Revolucio en Rusujo.

En la mezo de Januaro, iom post Barono de Launitz, falis sub la batoj de l' teroristoj Generalo Paulow, generala milita prokuroro.

Li estis partopreninta ageme en la granda parlamenta duelo ĉe Dumo, kontraŭstarante energie la forigon de la morta puno; aliparte li estis ĵus ludinta decidigan rolon dum la organizado de l' militiraj militaj juĝantaroj, kies severeco estis senegala. Lia morto aperas do kiel revenĝo.

Jen, tiuokaze, elokventa statistiko:

De februaro 1905 j. ĝis Novembro 1906 j. estas mortigitaj kaj morte-vunditaj: general-guberniestroj kaj grand-urbestroj — 67; urbestroj, poliestroj, policoficiroj — 315; grand-poliestroj kaj sub-grand-poliestroj — 57; policanoj, policeservantoj — 347; oficiroj de serĉado kaj ĝendarmaro — 49; ĝendarmoj — 95; agentoj de serĉado — 74; oficiroj de armeo kaj gvardio — 124; malaltrangaj anoj de armeo kaj gvardio — 382; oficistoj regnaj — 215; pastroj — 53; vilaĝestroj — 68; bienhavantoj — 73; fabrik-havantoj, fabrikantoj kaj altrangaj oficistoj — 117; bankieroj kaj grandaj komercistoj — 72; sume 2106 homoj; de l' flanko de la loĝantaro en la sama tempo, mortigitaj kaj mortevunditaj estas 32706 homoj.

Sarka Al-ov.
 „Perelom”

El Saratov.

En 8 h. kaj 40 m. de l' 9^a t. Novembre, per pa-

fo el revolvero en la koron finis sian mallongan vivon nia samideano, junulo dekokaga S^{ro} P. F. Aleksandrov, gimnaziano de oka klaso. En tago de l' la enterigo de S^{ro} P. F. Aleksandrov, sammaniere mortigis sin plej bona amiko de li, S^{ro} S. V. Danilov, ankaŭ samideano kaj gimnaziano de oka klaso de l' sama gimnazio.

La Universitato de « Les Annales »

Ĉiuj vivantaj ekster Francujo, kiuj amas la francan lingvon — ĉu Francoj, ĉu fremdoj ŝatantaj la belecon de la lingvo kaj la ĉefverkojn de ĝi naskitajn — legas « Les Annales politiques et littéraires », universale konataj per la pli familia nomo *Les Annales*.

Do, ne sole la Francoj, sed sufiĉe da niaj legantoj ekscios plezure pri fondo de Universitato, kies kursoj — speciale dediĉitaj al fraŭlinoj — celas pleningi la instruitecon de la fraŭlinoj per paroladoj, kursoj superaj, faritaj ĉiuj de la plej eminentaj francaj historiistoj, filozofoj, literaturistoj. La hejraj artoj kaj ankaŭ la mastrumaj, la muziko, ne estas forgesitaj.

La solena malfermo de la «Universitato» okazis la 20^{an} de Januaro 1907 kaj estis vera festo por la okuloj kaj l' oreloj. Ĉio, kion Paris kalkulas kiel eminentulojn ĉe estis la feston, kiu altiris stelarojn (plejadojn) el ĉarmaj fraŭlinoj kaj junaj virinoj, kiel ĝin montras la najbaran vidaĵon.

A. MONTROSIER.



INAŬGURACIO DE LA UNIVERSITATO DE « ANNALES ».

Automobilismo : La ĉiujaraj ekspozicioj ; kelkaj konkursoj. — Ciklismo : La « Ses Tagoj » de Nov-Jorko. — Piedpilkludo. — Diversaj Sportoj.

AŬTOMOBILISMO.

La Ĉiujaraj Ekspozicioj.

La vintro estas ĉie la sezono de la « salonoj » (Ekspozicioj) de aŭtomobiloj, kiuj okazis en Nov-Jorko, Londono, Parizo, Berlino, Bruselo kaj okazos baldaŭ en Turino. La ĉefa, nediskuteble, el ili estas la pariza salono, ĉar Francujo estas patrujo de la aŭtomobilismo ; ĝi okazis en « la Granda Palaco » kaj ĉiuj gravaj firmoj el Tutmondo tie elmontris siajn verkojn.

Kiuj estas la novaĵoj ? Nenia genia eltrovo estas montrita. La motoro je petrolo nune estas tipo (modelo) definitiva. De nun oni nur perfektigos ĝin pri detaloj. Tio estas la ĉefa impresio. La « ĉasio » (1) 1907 celas al proksimiĝo de uniforma modelo kiu estas kiel sintezo de la plej taŭgaj modeloj 1906. Oni nur perfektigos per studo pacienca kaj serioza la detalojn, kaj nur tiu akurata studo ebligis la gradon de perfekteco de la nunaj aŭtomobiloj. La vertikala motoro triumfas definitive ; nur kelkaj firmoj amerikaj kaj anglaj konservis la horizontalan motoron. La grava novaĵo estas la uzado de la motoro ses-cilindra por la potenco preter 40 m. ĉ. Sed, certe, la motoro unu-cilindra estos ĉiam taŭga por la veturiletoj ĝis 8 m. ĉ., pro ĝia simpleco, malkareco kaj fortikeco. Por la gravaj potencoj oni ne havas profiton, pligrandigante la nombron de la cilindroj preter ses, ĉar la ses-cilindra motoro estas perfekte ekvibrata kaj povas funkciadi kun reguligado tute malpeza. La cilindroj de ŝtalo estas sufiĉe multaj kaj ĉiam provizitaj per kupraj ĉemizoj. La klapo meĥanike levebla certigas sian venkon.

La konstruistoj celigas la publikon al la potencaj maŝinoj 35/50 m. ĉ. Feliĉe kelkaj el ili ne forgesis, ke ĉiuj personoj ne estas milionuloj kaj proponas al ni zorgitajn veturiletojn, kies prezo meza estas 3.500/5.000 frankoj. Multajn tri-karojn (2) oni vidas, kies modo venas el Anglujo kaj ne plu nur simplaj motorcikloj kun antaŭe seĝo sed veraj veturiletoj tri-radaĵ kun malgranda gracia « karosaĵo » (3). Tie ĉi ni elmontras unu el tiuj maŝinoj : La Tri-Veturileton Ivry (4) tute allogan maŝineton provizatan de 6 m. ĉ. motoro kun ŝangilo de rapidumo kaj « embrajilo » (5). Je mia opinio, la plej taŭgaj veturiloj estas la sekvantaj : por du personoj nur, tri-karo aŭ veturileto kun motoro unucilindra ĝis 8 m. ĉ., kiu nemulte da petrolesenco konsumas, nemulte da pneŭmatikoj, kaj sume ne estas tro altpreza. Por kvar aŭ kvin personoj laŭ deziro de rapideco la veturilo 14 m. ĉ. kvar-cilindra aŭ la 20 m. ĉ. Mi ne parolas pri la superaj potencoj kiuj estas manĝegantoj de petrolesenco, pneŭmatikoj, kaj kiuj malplenigas rapide la monujn de sia posedanto.

La aliaj nacioj fabrikadas nune preskaŭ tiel bone, kiel Francujo, ĉar ili forlasis siajn strangaĵojn kaj kopias la francajn modelojn. Citu ni la progresojn grandegajn de Anglujo, Belgujo kaj recipe Italujo, kies grandaj firmoj konstruadas perfekte. En Ameriko, la modelo je la modo estas la veturileto malpeza simile al kura veturileto, nomata « runabout », ĝi havas gravan sukceson ĉe la klientaro (6). La firmoj de tiu lando ĉesigis fabrikadon de meĥanikaĉo kaj proponas al ni nun bonan meĥanikon.



TRI-VETURILETO IVRY

Kompanio ĝenerala de elektro en Parizo.

Kelkaj konkursoj.

Konkurso de industriaj sargveturiloj, organizita de la franca Ministraĵo de la Milito, okazis de la 19^a de Nov. ĝis la 5^a de Dec. sur la vojo Parizo-Monte-Carlo kaj reiro. Ankaŭ sur la sama vojo kaj samtempe konkurso de ĉasioj por turismaj veturiloj. La rezultatoj de ambaŭ estis bonegaj.

CIKLISMO.

La « Ses Tagoj » de Nov-Jorko.

La mondfama kurado de la « ses tagoj » de Nov-Jorko okazis meze de la entuziasmo atendita. Por diri veron ĝi estas tute malproksima de la sporto kaj estas nur komerca afero tute profitdonanta por fama Pat. Powers, kiu enspezis multajn ŝatindajn bank-biletajn. Tiu spektaklo fama estas vera foiro por la Nov-Jorkanoj, kiuj amase apudeblas la « kurejan bedon » (8) konstruitan pro tio en « Madison-Square » Halo. La kurado estas farita per « ekipoj » (8) de du kuristoj, kiuj anstataŭas unu la alian, por ke unu el la ekipo estu ĉiam sur la bedo. 16 ekipoj foriris kaj 10 finis la kuradon.

La venkinta ekipo estas amerika Root-Fogler kiu suriris 2,292 mejlojn 2 rondoj t. e. 3,688 km. 904 m.

La ekipoj la plej aplauditaj estis la fratoj Georget (Francoj) Walthour-Bedell (Amerik.), Rutt-Mac Farland (Germ. Am.), Ĉiuj sekvis je kelkaj metroj nur unu la alian. Prezoj : 7,500 fr. la unua ; 500 fr. la sepa.

PIEDPILKO-FOOTBALL.

La Sud-Afrikaj piedpilkistoj migris en Eŭropon kaj, kiel la lastan jaron la Nov-Zelandanoj, venkis preskaŭ ĉiujn ekipojn, kiujn oni starigis kontraŭ ili. Dum 27 kunvenoj ili venkis ĉiujn ekipojn de Anglujo krom du inter ili la Cambridge'a ekipo, kiu havis la gloron venki la « Antilopojn » (Alno de la Afrikanoj). En Parizo ili « pistis » la francajn ludistojn

per 54 poentoj kontraŭ 5. Ili estas tute fortaj, facilmovaj, kaj lertaj. Ilia luda maniero estas unu el la plej belaj, kiujn oni povas vidi.

ALIAJ SPORTOJ.

Kurado tra kamparo (Cross Country), nomita de la « Kora Konsento », okazis la 9^a Dec. en Enghien (apud Parizo). Raguenan-franco alvenis unua antaŭ Pearce-anglo kaj Guesnon-franco. La ekipo angla de Highgate Harriers estis je la unua vico de la klasifiko per ekipoj antaŭ Societo Atleta de Montrouge, Belga ekipo kaj Racing-Club de Franco. La fama Aldridge-anglo, mankante de sporta preparado alvenis 24^a.

Du italaj aerostatistoj Soj Usuelli kaj Crespi transiris la Alpoj el Milano ĝis Aix-les-Bains super la « Blanka Monto ».

La provoj de l' aerostato direktebla franca PATRIE (Patrujo) estis plenumataj sukcese.

TOUS LES SPORTS, ĵurnalo oficiala de l' Unuiĝo de la Societoj francaj de Sportoj atletaj, malfermas rubrikon en Esperanto. Bonege.

L. DE GUESNET.

(1). « Ĉasio », angle : chassis, france : châssis = la tuta meĥanika parto de aŭtomobilo. — (2). « Tri-Karo » = angle, france : « tri-car ». — (3). « Karosaĵo » fr. : Carrosserie, germ. : Karrosserie. — (4). Rue Boudreaux, Paris, koresp. en Esp. — (5). « Embrajilo » fr. : embrayage, ang. : clutch, hisp. : embragiamiento. — (6). Mi estus treege danka se samideanoj amerikaj bonvolus sendi al mi katalogojn de la plej famaj « runabout » sendu ĉe T. la M. je mia propra nomo L. G. — (7). Fr. : piste, angle : track. (8). Fr. : équipe, angle : team.

Aferoj teatraj.

Improvizadoj de F. FLORES GARCIA, (Hispanujo).

Ni havas la plezuron doni ĉi sube fantaziaĵojn de S-ro F. Flores Garcia, sprita hispana verkisto, kiu tre afable donis al nia amiko, A. L. Villanueva, tradukan permeson, sendante ankaŭ sian portreton por « Tra la Mondo », kun amika letero pri la gazeto.



PORTRETO DE L' VERKISTO.

precipe el la publiko supresidanta, spritaĵoj, frazoj kaj akutaĵoj multvaloraj. La aŭdantara cetero festas ilin ĝoje... kaj ne konsideras sin tiel multe trompita.

Jen estas do, kelkaj rilataj anekdotoj nepre historiaj.

Iam estis unuafoje prezentata komedio en Madrida teatro; la unua akto trankvile pasis, kaj en la komenco de la dua, kiam la aŭtoro povis kaj devis juĝi la batalon tute perditan, en momento de respekta silento, kiam la nubo estis ĵus eksplodonta, sidigis por skribi unu el la aktoj, dirante la jenon dum sia skribado:

« S-ro N... Mia respektinda sinjoro »...

Tiam eliris voĉo el la 2^a amfiteatro, klare diranta: « Du punktojn! »

La rimarko ortografia estis akceptata per grandaj ridegoj, kaj de tiam estis nek ebla sukceso, nek ripoza momento.

Alia inaŭguracio kaj alia interrompo kruele sprita:

Oni ekzekutis (en senintenca senco), (*) teatran verkon kaj la publiko ne trovis, eĉ okaze, unu solan spritaĵon. La elektro ŝarĝadis la atmosferon iom post iom; kiam la ĉeestantaro estis preta por pasi de l' oscedo al bastonfrapado, unu sinjoro sidanta meze de la salono, ekkrias laŭ la plej sarkasmaniero, kiun la ironio povas elpensi:

« Kiel ni amuziĝas! »

Post aplaŭdado bruega al la sinjoro, mokbruado daŭris ĝis la fino... kaj la verko, teren.

Ne ĉiam ekster la scenejo elmontriĝas la sprito, dum tiuj momentoj altegaj de la malvenko. Ankaŭ ni havas spritajn aktojn, kiuj pruntas lignon al la fajro, aŭ viandon al la besto, kun *nobla malavareco*, kiam la aŭtoro estas jam la celo de la mokpafoj.

En unu el la plej grandaj timegindaj skandaloj, kiujn ni aŭdis kaj vidis, okazis la jeno:

Oni prezentadis teatran verkon duaktan; kaj tuj de la dua sceno komenciĝis alarme bruado tiamaniere, ke ĉeestantoj kaj aktoj faris dialogojn.

Antaŭ la fino de la unua akto, malaperis aktoro, forportita kontraŭvole de aerostato. Kiam la duono de la dua akto estis pasinta, la dirita aktoro falis sur la sablon vestita laŭ arlekena.

La publiko ne submetiĝas facile sub la tedo. Kiam la komedio prezentata ne ĝin amuzas, ĝi penas amuzi sin sola, per siaj propraj rimedoj, kaj preskaŭ ĉiam ĝi tion atingas, ne pripensante, ke estas multaj alestantoj, kiujn pli ankoraŭ amuzas tumulto ol sukceso.

Per justa kompensa leĝo, kiam la sprito de la aŭtoro malsukcesas, kaj lia trompiĝo naskas nesufereblan enuon, elĉeniĝas tiam la genio viva kaj propramova, el la ĉeestantaro.

En la momentoj decidigaj de teatra malsukceso, eliras el la publiko,

Tiam la ĉeestantaro salutis lin per ega mokbruado, kaj li, donante al sia vizaĝo rimarkindan esprimon de komika malgajo, ekdiris:

« Se mi estus sciinta tion, mi ne estus malsuprenirinta ».

Je tio respondis la publiko per bruega aplaŭdado kaj grandaj ridegoj, mokfestante la spritaĵon tiel, kiel ĝi meritis.

Iafoje la interrompiĝo estas propra konsekvenco de la bonfido. Ekzemple:

Eniras sur la scenejon aktoro (Tio okazis dum verka inaŭguracio ĉe *Teatro Español*), kiu unue diras, ke li rapidas kaj ne povas halti; ke li venas por diri adiaŭ, ĉar li forveturos per la vagonaro *rapidira* forironta post malmultaj minutoj. Tion dirinte, li ekbabilas... kaj neniam haltas.

Unu el la ĉeestantoj, konsiderante la scenan fiktivaĵon kvazaŭ viva realaĵo, tute absorbita de la komedio, atente sekvante ĝian malvolviĝadon, kaj sidanta sur galeria antaŭaĵo, ekkriis laŭtege:

« He, sinjoro: la vagonaro tuj foriros! »

La publiko baldaŭ rimarkis la kontraŭsencan de la scena situacio, kaj mallaŭdante la verkon, aplaŭdis prave la bondeziron (kiu estis kritikaĵo) de tiu ĉeestanto.

La interrompiĝo prenas iafoje formon de afabla sindonema konsilo.

Antaŭ kelkaj jaroj estis prezentata komedio ĉe *Teatro Principal* de Malago, kies temo apartenas al la epoko de Filipo IV^a. La junamisto de la verko surportis sur sia kapo tro grandan perukon. Li estis maldika kaj malaltkreska; tial, tiu peruko sur lia kapo, ŝajnis perukegon. En plej interesa momento de la komedio, la junamisto restis sola, kaj komencis monologon tute plenan je dilemoj kaj disigoj. Atinginte la plej konfuzigan gradon de siaj pripensoj, li diris:

— Unuflanke, la reĝo; aliflanke, Elviro;... kion mi faros, Dio mia, kion mi faros?

— Tondigu viajn harojn! respondis ĉeestanto; kaj tiam finiĝis la komedio, ĉar jam oni ne povis preni serioze la plendojn de l' multharulo.

.

Se mi rimarkigus ĉiujn tiuspecajn improvizaĵojn kaj interrompojn, pri kiuj mi memoras, mi neniam haltus. Sed mi estas devigata halti, tial ke ĉio estas finhava, (eĉ la pacienco de la legantoj); mi do finos tiun ĉi verkaĵon, alĝustigante min al la temo, per interrompo.

Mi sekve, interrompas mian taskon kaj foriras trans la scenejan malantaŭon. Ĝis alia okazo.


Esperanten tradukis,

A. I. VILLANUEVA.



PORTRETO DE L' TRADUKINTO.

(*) La verbo ekzekuti, signifas ankaŭ, hispanlingve, fari, efektiviĝi k. c. Tial la aŭtoro diras sprite: « (en senintenca senco.) » (N. de la T.).



MALGRANDA ESTAĴO, KOVRITA PER GRIZA MANTELO SUBITE EKSTARIS EN LA ĈAMBRO.

La misteraj piloloj de doktoro Kohol

Stranga historio, de HANS ROMANOWICZ, Wien (Austrujo) (1).

Mi, plue, estis devigata doni al ĝi tian koloron, kiu subite tute blankiĝas en sunlumo. La piloloj devas ĉiutage kuŝi kelkajn horojn malfermitaj en la taglumo, sed pro la jam montrita kaŭzo oni devas zorgige malhelpi, ke ia sunradio ilin tuŝu, alie ili ĉiuj senvalorigus, ĉar oni ne sciuz, kiu estas la venena kugleto! »

Apenaŭ mi vekigis el mia mirego pri ĉi tiu nova sciigo, kiam la fremdulo subite leviĝis:

« Akceptu ĉi tion kiel memorajon », li diris, donante al mi la plenan skatoleton, « mi ne povas pli longe resti ĉi tie! La misteraj piloloj alportos al vi feliĉon, sed gardu vin de spegulo!! »

Li premis mian manon malaperante, kvazaŭ per sorĉa potenco, tiel rapide ke mi ne povis lin danki.

Malklare mi memoras, ke moka rideto tiam surkuris liajn trajtojn.

Forlasinte la drinkejon mi nun hejmen iris. Estis jam tre malfrua horo, ĉiuj magazenoj estis fermitaj; malsata, mi kuŝiĝis. Ekvekiĝante la postan matenon, mi kredis ke mi ĉion estis revinta, sed trovante la pilolan skatoleton en la poŝo de mia surtuto, mi tuj vidis la travivaĵon antaŭ miaj okuloj.

Mi fartis tre bone; anstataŭ malespero, gaja trankvileco min ekprenis. Pripensante kion mi nun faros, mi projektis uzi la enhavon de l' skatoleto por resanigo de malsanuloj.

Baldaŭ mi gajnis grandan famon kiel mirakla kuracisto. De ĉiuj partoj de l' tero homoj alkuris,

plezure pagante la grandegajn sumojn postulitajn de mi por la kuracado.

Iafoje mi liberigis multoblan milionulon de nekuraĉebla malsano; donacinte al mi duonon de sia havo, li ĝoje vidis min amantan lian belegan filinon Annon.

Doninte al mi Annon kiel edzinon, li konstruigis mirindan palacon por nia uzado.

Tute sendezire pro tiel multe da feliĉo, mi transloĝiĝis kun mia anĝelsimila juna edzino en la ravan hejmon. La skatolo, enhavanta la misterajn pilolojn, kuŝis sur mia skribotablo, sub vitra kloŝo, tialoke ke neniam ia sunradio povu ĝin tuŝi, tute laŭ la ordono de doktoro Kohol. La nombro de l' piloloj jam estis tre malgrandigita, ankoraŭ nur du blankaj kugletoj enkuŝis la skatolon, esceptinte la bluan, neuzeblan. Mi ĵuris ke mi ilin neniam vendos, retenante ilin por nia propra uzo en necesega okazo. La tagoj pasis rapidege, mi vivadis kiel en ĉielo, ĉiuhore pli amante mian edzinon. Koro dolore kurtiriĝis al mi, je la penso ke mi povus ŝin perdi. Sed ni estis kaj restis sanaj, iom post iom tute forgesante la pilolojn de doktoro Kohol.

Iavespere mi sidis, gaje interparolante kun Anno, en mia skriboĉambro.

Jen ŝi subite silentis kaj diris ridante:

« Estas ja stranga afero, ke ci, karulo mia, ne volas toleri spegulon en ĉi tiu ĉambro! »

Per tio ŝi rememorigis subite al mi la misteran

(1) Sekvo. Vidu la Januaran Numeron.

okazintaĵon, kiu formis la fundamenton de mia feliĉo. Ŝi nun tiellonge turmentis min en ŝerca maniero, ke mi rakontis al ŝi la kaŭzon de mia antipatio je speguloj. Kiam mi finis la rakonton ŝi mokis min, kredante ke la tuta historio estas nur fabelo. Mi ne povis miri pri ĉi tio, ĉar al mi mem la afero ŝajnis esti fabela elpensajo.

Nu — Anno insiste postulis ke spegulo, estu enmetota nepre en ĉi tiun ĉambron.

« Ĉi tie », ŝi diris, « por spegulo estas konvena loko ! »

Trovante ridindaj miajn kontraŭdirojn, ŝi ploris kiam mi ne volis plenumi ŝian deziron.

« Kian malfeliĉon, pro Dio, povos do alporti simpla senviva spegulo ? », ŝi senĉese diris.

Fine ŝi eĉ dubis je mia amo.

Kion fari ? Mi devis ekkonsenti !

Jam la venintan tagon multkosta spegulo paradis je la muro. Trankvilo ree regnis en mia domo.

Pasis kelkaj monatoj. Jen subite malsaniĝis mia edzino. Komence, pensante ke estas nur negrava afero, mi ne venigis kuraciston ; ankaŭ tiam, kiam ŝia farto plimalboniĝis. Mi ja la misterajn pilolojn posedis, kuracilon kontraŭ ĉiu malsano.

Fine, ne povante plu vidi la suferadon de mia koramikino, mi decidis oferi unu el la piloloj por resanigi ŝin momente.

Kun la certa penso, ke mia sorĉa potenco venkos, mi enpaŝis la ĉambron, kie estis la piloloj ; per kvieta mano mi levis la vitran kloŝon.

Ho ! — pro Dio — kio okazis !

En la ujo kuŝis tri tute egalblankaj piloloj : estis neeble eltrovi sanigantajn pilolojn. Teruro ekprenis min, puŝante min malantaŭen. Ho ! jen tuŝis mian okulon brilega sunradio, en kiu gaje dancadis polveretoj ; la malleviĝanta vespera suno lumis sur la granda mura spegulo, kaj ĉi tiu resendis la helajn radiojn rekte al la piloloj !

« Gardu vin de spegulo, gardu vin de spegulo ! » mi kiel frenezulo murmuris, premante la manojn kontraŭ la doloranta kapo.

Mi ne scias kiom da tempo mi staris ĉi tie en mia malespero, sed mi tuj vekigis kiam servisto eniris rapide ekkriante :

« Ho sinjoro ! Kion ni devas fari ? Sinjorino falis en teruran febron, ŝi estas preskaŭ mortanta ! »

« Rapidu, rapidu ! » mi ordonis, « venigu tuj kuraciston, la plej faman kuraciston, pagu monton da mono se li tiom postulos ! »

Jam post kelkaj minutoj kaleŝo traveturis la pordegon de mia palaco por alkonduki la plej faman kuraciston.

Per mallaŭtaj paŝoj mi eniris la ĉambron, en kiu batalis kontraŭ la kruela morto la plej kara homo kiun mi ĉi tere posedis.

Tra la fenestra malfermaĵo, kiun multpezaj, malhelaj velurkurtenoj formis, enrigardadis ĉielo, sur kiu kuntiriĝis nigraj pluvaj nuboj. Plendante la vento jetis la gutojn kontraŭ la altajn fenestrajn vitrojn.

Dolĉa ruĝeta lumo de lampo malsuprentremis kiel la lasta rebrilo de malleviĝanta suno, traglitante la ombrojn de krepusko, karesante la korpon

de la bedaŭrinda malsanulino. Senmova ŝi kuŝis ; iom post iom ektremis dolore la pala vizaĝeto, kaj la malgrandaj manoj malkviete iris tien kaj reen.

« Ĉi tien oni devas meti la spegulon, grandan belegan spegulon » ŝi murmuretis febre.

Ekkaptita de subita dolorego, genufleksante ĉe ŝia kuŝejo, mi dolĉe karesis ŝian oran blondan hararon, kovrante ĝin per miloj da kisoj :

« Anno, mia kara, mia feliĉo » mi petegis, « ne forflugu, mia soleamata kolombo ! »

Jen, kiam vento ĝemante ekblovis kontraŭ la fenestraj vitroj, iu mallaŭte frapis la pordon.

Malgranda estaĵo, kovrita per griza mantelo subite ekstaris en la ĉambro, kvazaŭ elirinta el tero.

« Mi estas la kuracisto ! » diris la fremdulo klarigante, klinante sin al la mortantino.

Kun maltrankvilega atento, mi fiksas la okulojn al lia vizaĝo.

« Oni nenion povas fari ! » li fine serioze diris, « Ĝi estas heredita malsano. Unu sola kuracilo estus povinta sanigi vian edzinon : la misteraj piloloj de doktoro Kohol, sed ĉi tiu verŝajne jam de longe estas mortinta ; la strangulo kun sia sekreto iris en la tombon ! »

Ankoraŭ unu fojon mia kara Anno malfermis siajn grandajn belegajn okulojn, rigardante min kiel mortanta kapreolo, poste la glaciga blovo de la morto trafugis la luksegan ĉambron.

Laŭte ĝemante, mi volis min jeti sur la malvivan korpon, kiam la doktoro rapide intersaltis. Kolere mi rigardis lin. Ho ! kiel vualo falis de miaj okuloj :

« Ĉu vi ekkonas min, kara amiko, vian humilan servanton Kalmus Kohol ! » ekkriis ia pepanta voĉo. Antaŭ mi, staris malgranda terura malgrasa hometo en nigra vestaĵo.

Ekstere blovis infera ventego.

« For de mi, fripono ! » mi ekkriis, « mian feliĉon vi detruis per viaj misteraj piloloj, for de mi, en la inferon, diablo malbenita ! »

Doktoro Kohol moke ridante restis senmova.

Preskaŭ treneza pro kolero, mi levis la pugnon sed mi nur trafis malplenan aeron ; diabla ridego eksonis kaj mi senkonsciencie falegis teren.

« Ho, leviĝu, leviĝu, oni fermas la drinkejon ! » iu maldolĉe kriis. Dormema mi ĉirkaŭrigardis.

Penetrantaodoro de kruda brando eniĝis mian nazon. Kelkaj malhelaj gasflamoj vane penadis lumigi la sengastan, mucidan (malbonodoran) drinkejon.


« Kie mi estas, — kie estas — doktoro Kohol ? ! » mi balbutis. La mastro ridante ŝovis min eksteren tra malfermita pordo. La malseka, malvarma aero baldaŭ min rekonsciigis. « Ĉio estis sonĝo alkohola, ĉio estas malaperinta ! » mi, forirante, murmuretis per rauka voĉo.


Aŭtomate mi ŝovis la manon en la pantalonan poŝon. Nenia helero enestis plu. Malnovan, malmolan pankruston mi trovis. Elpreninte ĝin mi avide, kiel besto, manĝis, ĉar mi estis malsatega.

Originale verkita kaj ilustrita por

« Tra la Mondo »

de HANS ROMANOWICZ kaj ANTON RASCHKA.



B.1^a. — TRANSKONDUKANTA PONTO DE BILBAO (HISPANUJO).



Transkondukantaj pontoj super la markoletoj.

El ĉiuj ĝis nun ricevitaj solvoj por la transkondukado super la markoletoj, la plej nova kaj certe la plej utila en multaj lokoj de l' mondo estas tiu nomata transkondukanta Ponto. Ĝia principo estas simpla. Oni konstruas super la markoleto ponton, kies ferdeko sidas je 50 metroj super la marnivelo; tio permesas al la plej altaj vel-kaj vaporŝipoj malsupre naĝadi sen ia baro. Pluraj (1) relvojoj, kunmetitaj sur la metala punta ferdeko, servas kiel gvidiloj por metala ĉaro metita sur radetoj, de kiu pendas veturilo. Ĉar la ir-kaj reira movo de la metala ĉaro, aŭ por same diri, de la veturilo, estas elektre direktata de kondukisto, oni komprenas, ke la homo fariĝas estro de fiksita enaera vojo



dank' al la transkondukanta pendveturilo, en kiun oni, ĉe l' nivelo de l' bordmarŝejo, enveturigas piedirantojn, ĉeval-kaj tramveturilojn, k. t. p., por konduki ilin trans la markoleton. Kompreneble, oni tiel ne malhelpas la ŝipradon, ĉar la kondukisto povas laŭvole direkti antaŭen aŭ malantaŭen, tute kvazaŭ li direktus tramon.

Cetere, tiu ir-kaj reira movo de la veturilo, de bordo al alia, estas sendependa de la vetero, t. e. de la maro, marleviĝo, vento, glaciajetoj, nebuloj, marfluo, kiuj malhelpas la naĝadon de la pramoj aŭ riverŝipoj, kutime uzataj por la pasado tra la markoletoj.

La unue konstruita transkondukanta ponto estas

B.2^a KAJ 3^a. — TRANSKONDUKANTOJ DE MARTROU (FRANCUJO) KAJ BIZERTE (TUNIZIO). — PENDVETURILOJ EN FUNKCIADO.

(1) Pluraj = pli ol unu.



STARIGO DE KOLONO DE LA TRANSKONDUKA PONTO DE NANTES.



B.4^a — 1^a FazoB.6^a. — 3^a Fazo

en Bilbao (Hispanujo) super la Nervion'a rivero en 1889. (vidu B. 1). Ĝia konstruisto estas S^{ro} Arnodin, la elpensinto de la sistemo nomita «transkondukanta ponto». Depost tiu tempo, multiĝis similaj konstruaĵoj; en Francujo, inter la pontoj konstruitaj de la firmo F. Arnodin, ni citu: la transkondukantan ponton de Rueno (Rouen), super Sejno (Seine) en 1907, de Bizerto (Tunizio), ĉe l'enirejo al la kanalo, en 1898. Ĉi tiu ponton oni en 1905 malkonstruis, peco post peco, por ebligi la plilarĝigon de la kanala enirejo, kiu, antaŭe larĝa je 100 metroj, estos je 200 metroj; sed la dirita ponto estas rekon-

struita dum la jaro 1906, en la Bresta armelejo super Penfelda rivero.

Post la Bizerta transkondukanta ponto, oni konstruis similajn en Martrou, apud Rochefort (Charente) dum 1899, en Nantes, laŭ nova sistemo de la sama elpensinto kaj konstruisto, dum 1901^a, kaj en Marseille, ĉe l'enirejo al malnova-Haveno, dum 1904. Fine, la transkondukanta ponto de Newport-Mon super Usk'a rivero (Anglujo), nun uzbla, estas konstruita laŭ la planoj de S^{ro} F. Arnodin.

Aliparte, la transkondukanta ponto de Widnes kaj Runcorn, super Mersej'a rivero, (Anglujo)

B.5^a — 2^a Fazo.B.7^a — 4^a Fazo.



B. Sa. — LA KOLONO PRESKAŬ TUTE KONSTRUITA.

X montras la levadon de metala trabo, longa je 35 metroj, kaj apartenanta al la ferdeko de transkondukanta Ponto de Nantes (Vidu B. XII). Tiun ferpecon levis elektra rado levila, ĝis alto je 50 metroj en 4 horoj; ĝi pezis 46.000 kilogramojn.



Pri la transkondukanta Ponto de Marseille la samaj levoprocedoj estis farataj; ni tamen diru, ke en Marseille la kolonoj estas altaj je 80 metroj kaj la longo inter ambaŭ kolonoj atingas 165 metrojn.

Estas citinde, ke la grano, kiu levis la kolonojn de la transkondukanta ponto de Nantes kaj Marseille liveris neatenditajn rezultatojn pri la elektra energio elliverita en tiuj ambaŭ okazoj.

En Nantes, por la levo de kolono alta je 76 metroj kaj peza je 200000 kilogramoj, la suma ellivero de elektra energio atingis 280 kilovathorojn; en Marseille por kolono alta je 80 metroj kaj peza je 250000 kilogramoj, la suma ellivero de elektra energio atingis 344 kilovathorojn; tio estas, ĝi kostis 56 fr. en la unua okazo, kaj 68


iniciatita de inĝeniero Webster, kaj tiu de Deluth, iniciatita de inĝeniero Turner, estas kopiitaj laŭ la antaŭaj sistemoj. Tiuj jam de multaj jaroj servintaj konstruaĵoj aŭ nun farataj en multaj lokoj, videbligas la servojn jam ricevintajn de la ĝis nun ekzistantaj kaj plene certigas pri ilia bona funkciado.

Bildoj II & III montras en funkciado la pendveturilojn de tiuj konstruaĵoj; la ampleksoj de la pendveturiloj kaj la ŝarĝoj, kiujn ili povas enporti, ŝanĝas proporcie kun la interkomunikaĵoj. Oni kutime alprenas jenajn mezajn ampleksojn pri la vasto de l' pendveturilo: 12 metroj da larĝo, kaj 10 metroj da longo. Por montri la pezon de la rulŝarĝoj riceveblaj, ni nur citos la eksperimentojn faritajn sur la laste konstruita transkondukanta Ponto, en Marseille, antaŭ ol ĝin liveri al la publika uzado la 24^{an} de Decembro 1905.

La tuta transkondukanta aparato, kiu kun sia ŝarĝaĵo, pezis 150.000 kilogramojn, malgraŭ tiu ŝarĝego tre facile moviĝis de bordo al alia.

Ĉiuj ĉi pontoj estis konstruitaj per perfektigitaj levaparatoj elektre movitaj. Oni devas efektive levigi metalajn kolonojn kaj transkonstrui pontferdekon je 50 metroj super la maro, neniel malhelpante ŝipradon. Por tiu ferdeko, oni ne povas uzi ian trabaĵon. Peco post


peco, la kolonoj estas levitaj; bildoj IV, V, VI kaj VII montras la diversajn fazojn de la levado de kolono apartenanta al la transkondukanta Ponto en Nantes, alta je 76 metroj. Tiun levadon tre facile efektivigas aŭtoleva grano (1), konstruita ankaŭ de firma F. Arnodin. Bildo



(1) Grano = Crane (a), kran (g), geranion (greke), gru (h), grua (i), grue (fr.), krania (r). B. 9^a KAJ 10^a. — LA TRANSPORTO K. LEVADO DE L' MEZA METALA TRABO DE LA FERDEKO.

fr. 80 en la dua, je la meza prezo je f. 0,20 po kilovat-horo (1).

Tiu malalta elspezo montras kiom rapide amortizebla estas la kosto de tiuj perfektigitaj iloj, ĉar uzataj en labor-ejĵo, tiuj maŝinoj liveras ŝatindajn servojn. Komprenoble, uzante ilin oni plibonigos la ĝeneralan staton de la laboristoj, ĉar ili ne plu bezonas fariian gravan aŭ danĝeran muskolan penadon. La statistikoj, kiujn oni havas



B.11a. — TRANSKONDUKANTO DE ROUEN. — VETURILO EN SERVADO.


pri la enhaveco de la uzataj pendveturiloj de tiuj diversaj transkondukantaj pontoj montras, ke, en Rouen, ekzemple, ĉiutage trapasas ne malpli ol proksimume 5000 ĝis 6000 personoj ne enkalkulante la veturilojn, brutarojn, k. c. Dum la festoj, la pendveturiloj transkondukas 80.000 ĝis 100.000 personojn ĉiutage; tio okazis en Rouen kaj Marseille.

Originale verkita kaj tradukita de

LEINEKUGEL LE COCQ
Franca maŝin-inĝeniero

R. DE SAUSSURE (Internacia Scienca Oficejo)
Privat-Doĉento ĉe la Ĝeneva Universitato.

Ekslernantoj de la Franca Politeknika Lernejo.



B.12a. — LA TRANSKONDUKANTO DE NANTES.

(1) Celere, la konformiĝo esprimita per tun-metroj estas rimarkinda:

$$\text{en Nantes } \frac{230 \text{ kil. v. h.}}{200 \times \frac{76}{2}} = 3 \text{ hecto v. h., } 15; \text{ en Marseilles } \frac{344 \text{ k. v. h.}}{250 \times \frac{80}{2}} = 3 \text{ h. v. h., } 4.$$

Tertremo.

Originalo de AMFITEATREV', rusa aŭtoro. (*)

Sendube pro la poeziaj impresoj riceveblaj, io puŝis lin en la Hinduĵan militistaron. Malproksimiĝinte de la malsobra societo, li staris sola ĉe dorna kreskaĵa plektbarilo, rigardadis subirantan sunon kaj — li rememoras ĝin bone — pripensadis leteron al sia fianĉino en Liverpool.

Nome, ĉe duonvorto: «... Via fantazio ne havas forton imagi, o kara *miss* Florenŝjo, la nekalkuleblajn riĉojn de la Hinduĵa kreskajaro kaj best... » — li aŭdas post si pezegajn kaj oftajn batojn. Kvazaŭ ia grandegulo de supernatura kresko kaj forto, Ante' aŭ Atlaso, enbatigus en la teron, unu post la alia, longajn stangojn. Ne havis tempon nia revulo por returni sin; jam ekkaptis lin, de malantaŭe, io nekutime fortika, potenca, elastika, kiu suprenjetis lin alte en l'aeron. Kaj, lin svinginte kelkajn sekundojn, kiel pendolon, forte lin ĵetegis en pikajn arbojn de aloo — duonmortintan, ne tiel pro doloro, kiel pro timo de l' nekompreneo kaj nescio, timo de la plej danĝera kaj potenca en la mondo: ĝi estis priskribata, en l'antikveco, de Homero kaj Heziodo kaj en niaj tagoj — de Guy de Maupassant el la vortoj de Turĝeniev'.

La mizerulon oni malfacile elsvenigis. La diveno de la solvo montriĝis tre simpla: unu el la laboraj elefantoj de la farma mastro aliris ĝis kruĉoj da palmvino, malplenigis ilin, malsobriĝis kaj fariĝis furioza. La uniformo de l'suboficiro altiris l' atenton de l' drinkinta besto per sia heleco, kaj la kuzo de Malten fariĝis ĝia oferaĵo... Tian diversecon de la bestaro Hinda, ne sole *miss* Florenŝjo, sed ankaŭ ŝia fianĉo malfeliĉa mem, apenaŭ povis imagi al si!... Nu, la sento de tiu soldato, neatendite ekkaptita de elefanto, en minuto, kiam li ne nur ne pensis pri ia ajn difinita elefanto, sed ankaŭ, certe, forgesis eĉ ian ajn ideon pri elefanto — eble proksima estas al la sentaĵoj de homo en la unuaj minutoj de tertremo...

Estis klara kaj varma tagmezo. Ni, pensionuloj de *Hôtel de France*, en Perio, ĵus sidiĝis por matenmanĝi. Apud mi sidis Ruso — advokato el Peterburgo, tre originala sinjoro: spiritisto, mistikulo, kaj... specialisto pri eksedziĝaj aferoj. Kvar horojn poste, mi devis adiaŭi al Konstantinopolo kaj veturi per ŝipo Pireon. Miaj objektoj estis jam ĉirkaŭigitaj. Ni esperis gaie sidadi apud matenmanĝo por la adiaŭdiro kaj bonege ripozadi. La hotelmastro, *Herr Frankl*, la plej afabla kaj la plej bona el la homoj, kiujn Dio sendis al mi renkonte, alportis kiel kutime la novan, ĵus ricevitajn el la poŝto, numeron de « *Neue Freie Presse* » kaj tuj eklegis la politikan fakon. Tiu ĉi homo devis esti ne hotelmastro, sed ĉefministro, aŭ, almenaŭ..., prezidi en ia ajn angula respubliko. Kaj subite tio komencis...

— Kio do estas? — frapita estis mia najbaro, sentante tremeton de l' planko, subite skuĝanta sub niaj piedoj.

— Certe veturas paflegoj — trankvile rediris al li unu el la pensiuloj, franca *commis-voyageur* (vojaĝanta riprezentanto).

Sed la tremeto jam iĝis oscedego, aliĝis en ŝanceliĝoj.

Kaj mi rekonis mian malnovan konataĵon; mi stariĝis kaj diris itale:

— Sinjoroj, forkuru al la strato... Ĉi tie ne eble estas resti... Ĝi estas ne paflegoj... ĝi estas tertremo...

La salono tuj malplenigis.

Mi ne povas alkiuti al la terskuoj... sed en mi estas ia sperto, kiel ili estas suferotaj kaj kiaj rimedoj estas uzotaj, por ke, mi ne diras: ni savu nin el ĝi — se la sorto volas vin pereigi, vin nepre pereos! — sed por ke, almenaŭ, antaŭ la pereco, iom ni baraktu. Kaj jen mi restis sola en detruigonta domo, kun klara, malvarma kaj komprenplena konscio, ke mi travivas fortan terskuĝon, kaj ke ĉi tiu terskuĝo estas kredeble la morto!

La vorto: « skuĝi » ŝajne estas vorto sufiĉe difinita: « skuĝi » signifas — « rapide ŝanceliĝi vertikale, de supre malsupren. » Sed por terskuĝo, tiu ĉi difino estas tro malgranda. Vi sentas sub la piedoj tremadon; de ĝi komencas tremeti la fenestraj vitroj, saltas la vazaro sur tabloj kaj bretoj. Vi ĵus kredus ke, sendube, oni traveturigas sur la strato pezegan ŝarĝon, aŭ tratirigas artilerian veturilaron; vi ĵus pretiĝas insulti arĥitektistojn kaj dommastrojn, tial ke oni konstruas tiel ŝanceliĝemajn domojn, — jam surdigas vin furioza, elementa muĝo de la krueliĝanta « patrino » — Tero... Jes! ĝemo, bruado, se vi volas, ĝemego, sed nepre sono, kunligita kun ideo pri viva estaĵo. Ĝi ne estas frapo, aŭ frapego, ne tondro, ne bruo de marventego, ne paflega sonaro, ne rekrakado de montfalo, sed voĉo viva, timiganta vin antaŭ ĉio pro sia viveco. Pleje ĝi similas al krio de granda amaso — kolera aŭ ĝoja, tio estas egala: se krias dekoj da miloj, la diferenco malaperas. Kiam mi enpenetris la amason sub Ĥodinka, en tempo de la « glora » katastrofo de la 1896^a jaro, mi pensis, ke mi aŭdas « hurra » — sed tiel ĝemis, je dek metroj de mi, sufokiĝantaj homoj.

Mi rememoras ankaŭ: mi pririgardadis unufoje la bestojn kun belega elektajo da ursoj. Estis ses da ili. Subite ili, pro io, intermordadis kaj en unu momento plenigis la eltabulan budeton je kruela bruo.

Kaj ĝi estis, se vi volas, la plej simila el ĉiuj sonoj al la bruo de tertremo. La viveco de tiu ĉi ĝemo estas tia, ke mi aŭdinte ĝin unufoje en Tifliso, ekpensis komence, ke sur strato ludigas ia manifestacio Armenia. Mi estis okupata, mi ion skribis... subite — rrr... Mirigita, mi desaltas de la tablo kaj mia unua vorto estas: Kia do estas malkonvenaĵo!! Sed samminute, sur mian kapon falas stukaĵo, komprenigante al mi, ke la afero estas ne malkonvena sed malfeliĉa.

Kiam komencas aŭdiĝi la terura voĉo de la tero, oni tuj ne estas skuata, sed ŝanceliĝas.

La ŝanceloj agas ne de supre malsupren, sed de flanko flanken, per longaj svingoj. Kompari ilin al io ne estas ebla. Iuj provas kompari ilin kun ŝancelo dum forta marventego. Sed ne, ĝi ne estas

(*) Sekvo. Vidu la Januaran Numeron.

ĉi tio. Mi okaze travivis fortajn ŝanceliĝojn. Ne parolante pri tio, ke ili ne elvekis en mi ian ajn teruron, sed estis nur interesaj, la sento de nefirmeco sub la piedoj estas — tute alia. Kiom ajn fortaj estus la gradoj de la maraj ŝanceliĝoj, ili estus ĉiam nur ŝanceliĝoj: svingo supren, rapida falo malsupren.

Kaj tio, tute regule: sekundo por suprenflugo, sekundo por subnaĝo. Al vi la spiro estas premkaptita, vi ne staras sur la piedoj — sed vi ne perdas la kapon: Vi tre bone komprenas tion, kio al vi okazas kaj kian ŝnuron vi devas ekkapti, por ke vi ne kuru barele sur la ferdeko. Sed kiam tertremo komencas skui la domojn, en via kapo komencas terura sensencaĵo; ĝin ne evitos la plej malvarmsanga homo. Afero estas tia ke ĉi tie malĉeestas reguloj por la movo supren kaj malsupren, al kiuj oni povas kaj devas alpretiĝi. Sed simple tiel: vin, ni tion supozu, neatendite oni renversis kun la dorso sur muron; tre dolore batita, vi tamen kontenta estas, ke vi trovis, kvankam kun domaĝo por viaj propraj ostoj, apogilon. Sed apenaŭ vi havas tiun rilatan kontenton, kaj jam vi ne staras; vi sidas jam sur planko. Kaj jen la planko unue horizonta fariĝis dekliva; jam muro forkuris elsube de via dorso, kaj vi surglitas tuŝante ĝin apenaŭ per la nuko. Kaj sammomente vi vidas, kiel alŝoviĝas al

vi la kontraŭa muro kun ĉiuj pentraĵoj kaj kandelabroj; ili dancas sur siaj najloj, pretaj eltiriĝi. Vi kovras viajn okulojn konsciante, ke post unu minuto — vi fariĝos mortinto, sed oni trajetis vin jam en angulon tute de vi neatenditan. Vi kuras for de tiu angulo, ĉar vi sentas, kiel ĝiaj flankoj rapidas reciproke unu al la alia, kiel ĝi el rekta pretiĝas iĝi akra, premane vian korpon laŭ ĉiuj gradoj de sia mallarĝiĝo. Kun nekredbla forto por starigi vin sur la kruroj, dum favora intertempo de l' terura ŝancelo, vi eksaltas sur ŝtuparon kaj ne konscias: Kio do okazis? Mi jam estas malsupre? Kiam Dio helpis?... Kaj vi vidas post vi dancantan ŝtuparon, detruitajn kornicon, derompitajn balkonojn... Kaj ĉio ĉi traviviĝas, sentiĝas, pensiĝas, okazas dum la tempo de kelkaj minutoj.

En Tiflis, kie estis mia *debut'* (komenco) en la tertremoj, oni instruis min: se la Σεισμός ekkaptos vin en domo, oni devas tuj iri apud la pordojn aŭ sur antaŭfenestron: pordoj kaj fenestroj ĝenerale detruigas la lastaj el ĉiuj kunmetitaj partoj de domo. Eble tio estas ĝusta, sed ofte okazas ke la plej bona teorio ne estas uzebla praktike.

Daironta

Esperantigita de LEO BELMONT,
(Polujo).

Ano de l' Lingva Komitato.



ESPERANTO ĈE LA JANULARO.

Nia artikoleto de la Aŭgusta Numero (1906), kun la fotografajoj de junesperantistaj grupoj el *Franco* kaj *Siberujo* havis multe da sukceso, kaj oni petis nin daŭrigi tiajn seriojn. Ni donas hodiaŭ fot. de du grupoj sufiĉe malproksimaj ankaŭ unu de la alia: *Amerika* kaj *Sveda*.

La unua fondiĝis en la konata «Roxbury Latin School» en Boston kaj propagandas per la bela revuo de tiu lernejo, *The Tripod*, en kiu troviĝas ĉiumonate sufiĉe ampleksan fakon dediĉitan al Esperanto.

Estas grava fakto ke tiu organo, legata de multaj lernantoj parolas regule pri nia lingvo, konigante la ĉefajn okazaĵojn indajn altiri la atenton de la junaj Amerikanoj. La profesoro estas fervora Samideano, Pro D. O. S. Lowell, kies portreton plezure ni enpresas sur alia paĝo.

Pri la grupo de junaj Svedoj, jen tio, kion oni al ni skribas: La «Klubo Esperantista de Falun» (Svedujo) fondiĝis en decembro 1905 ĉe la tiea kolegio. Ĝia celo estas konigi kaj disvastigi Esperanton, precipe inter la kolegiaj studentoj. Ĝi nun enhavas ĉirkaŭe 30 anojn kaj la membra nombro senĉese

pligrandiĝas. Kelkaj vortoj pri rimedo de l' klubo uzata por sciigi novajn membrojn je Esperanto eble povas interesi. La klubo estas dividita en du partoj, unu «pli alta» kaj unu «pli malalta». Al la pli «alta» apartenas tiuj membroj, kiuj havas bonajn sciojn pri Esperanto. La «pli malalta» enhavas novenirintajn membrojn, kiuj bezonas instruon pri la lingvo. La anoj de la «pli alta» havas devon, laŭ vico decidata de l' prezidanto, doni al la anoj de la «pli malalta» instruon necesan por l' akcepto en la «pli altan». Tiel la novaj membroj ricevas instruon laŭ privata maniero por, kiam ili estos akiritaj plenajn sciojn, mem fariĝi instruantoj. Tia rimedo ŝajnas multe pli sukcesplena por la klubo ol komunaj kursoj antaŭe aranĝitaj. La klubo ankaŭ posedas pruntan bibliotekon kaj abonas la gazetojn Esperantajn. Kunvenojn ĝi havas en kolegia ĉambrego afable disponebligita de l' kolegiestro.

La anoj kun plezuro korespondadas kun alilandaj samideanoj. Oni sin turnu al la sekretario: Sr^o Albert Ostberg. (Adreso: 35B, Sturegatan. *Falun*, Svedujo).

ARBARO.



Lernantoj de «Roxbury Latin School», Boston, U. S. de A.



Lernantoj de l' Kolegio de Falun, Svedujo.

Komprenoble, estas bona propagando konigi ke grava firmo aliĝis al Esperanto. Eĉ, kelkaj revuoj deklaraciis, ke ili senpage konigos la nomojn de tiaj firmoj.

Sed ĉu estas necese, por tio, fari ne sole daŭran anoncon unu-dulinian, sed eĉ grandajn anoncon, kiujn la interesatoj pagus altpreze en naciaj revuoj.

Ni pripensu: ĉu oni opinias ke tiuj firmoj aliĝis al Esperanto, ke kelkaj presigas kostajn katalogojn, dissendas multegajn cirkulerojn en Esperanto, por doni plezuron al esperantistoj aŭ helpi Esperanton? Tute ne. *Post serioza ekzameno*, ili konvinkiĝis pri la estonta valoro de Esperanto, kaj ili decidis preni, tuj de l' komenco, bonan lokon en la lando esperantista, ĉiea, senlima.

La plej bona pruvo, pri tio kion mi diras, estas la jeno: firmo tre konata, kiu sciis lerte uzi la nomon kaj leteron de nia majstro — kaj kiu deklaraciis antaŭ ne longe ke ĝi ne pagos reklamon en gazetoj esperantistaj (komprenoble! oni faris en iaj, fragmente, plenajn paĝojn da reklamo), sendis pretenditan sciigon propagandan per angla reklama specialisto! (*Advertiser*). La avizo havis proksimume duonpaĝan amplekson kaj oni petis senpagajn enpreson por la propagando!

Tio estas pruntedoni tro da naiveco al la adresitoj.

Por reveni al la esperantemaj komercistoj, salutinte ilian envicigon en la esperantistaron, por doni novan armilon al la propagando (kion ni faris por la ĉi supre aludita riĉa firmo), ŝajnas ke ni faris nian devon. Kaj ke, anstataŭ enpresaj, poste, gravajn senpagajn anoncojn, ni devus enpresaj nur reklamojn pagitajn, kiel estas la reklamoj de tiuj firmoj, hoteloj, k. t. p. en naciaj organoj.

Estus tute necese ke oni konvinkiĝu ke revuo Esperanta kostas monon same kiel nacia, kaj ke la eldonisto ne presas ĝin senpage, por la propagando; ke Esperanto ne donas rajton ricevi konstantajn servojn senpagajn, precipe de revuoj Esperantaj, kies sukcesos estos la plej efika propagandilo por la internacia komercio.

Fine, presante senpage komercajn reklamojn, oni trompus la firmojn kiuj, kompreninte mem tion kion ni ĵus diris, pagas senŝanceliĝe la anoncojn laŭ la tarifoj de l' Esperantaj gazetoj. La vidpunkto pri la komerca honesteco postulas egalecon de sintenado kontraŭ ĉiuj esperantemaj komercistoj.

Alia punkto meritas la atenton de la Esperanta gazetaro: nun multobligas la fakaj Esperantaj organoj. Tiam ni povas saluti plezure la naskigon de revuoj vere novaj, tiam ni devas timi la aperon de revuo konkurenca jam ekzistanta revuon ĉar, en la nuna situacio, unu faka revuo eble vivetos sed du samaj certe malutilos unu al la alia kaj samtempe al Esperanto.

Nu, ĵus reaparis sub nova direkto « Internacia Scienca Revuo » kiu, ĝis nun, pro la cirkonstanco, ne havis la prosperon esperitan komence. Kaj ĵus oni projektas fondon de matematika gazeto. Mi kredas fari servon al la aŭtoroj de la projekto dirante al ili: estu prudentaj; ne ekzistas kredeble sufiĉe da esperantistaj matematikistoj por liveri abonantojn al du gazetoj. « Internacia scienca revuo » enhavos matematikajn artikolojn; ĝi estas direktata de scienculo distinginda, S^o de Saussure, favore konata; ĝi estos organo de societo kiu certe iĝos potenca; do al ĝi iros plivole la abonoj, eĉ de matematikistoj, almenaŭ de tiuj kiuj ne interesigas nur al la matematikoj.

Estas do pli bone, nun, prokrasti efektiviĝon de projekto antaŭtempa. Kaj kiam la sukcesos de organo ĝenerala por ĉiuj sciencoj estos disvastiginta amplekse la ideon Esperantan ĉe la sciencularo, tiam nur povos naskiĝi organoj specialaj por tiu aŭ alia scienco. La malprospero de « Internacia Medicina Revuo » pravigas min tute, bedaŭrinde. Ankaŭ tiu de revuo, kiu anoncis frakase ke ĝi donos mirindaĵojn al siaj legantoj, faros pli bele kaj pli bone ol tio, kion oni jam vidis, kaj kiu mortis post la unua numero! Kvankam anoncita de persono tute nekonata en la esperantistaro, tiu gazeto trovis, eĉ antaŭ sia apero, sufiĉan helpon de kelkaj revuoj, kiuj komplekse konigis la videble trograndigitan programon.

Certe ili bedaŭris sian fidon, sed tro malfrue; kaj la personoj trompitaĵ, kiuj pagis revuon, kiun ili ne ricevas, havas la rajton koleri.

Pli kaj pli tiaj faktoj okazos se oni ne malhelpas ilin, ĉar pli kaj pli troviĝos personoj dezirantaj ekspluati Esperanton... kaj la esperantistojn.

La devo de la gazetaro estas eviti tiajn bedaŭrindaĵojn, igante sin pli singardema.

Petante pardonon pro tiu longa habelado, mi ĝin finas kun la espero, ke multaj mendoj aŭ almenaŭ petoj pri sciigoj alvenos ĉe niajn samideanojn komercistajn.

A. MONTROSIER.

Tra la diversnacia gazetaro, Bibliografio.

— En « A. Luta », politika gazeto de Porto Alegre (Brazilujo), traduko portugale de la amuza artikolo de J. C. Rust presita en « Tra la Mondo », pri la vivado de angla parlamentano. Aliparte en « Forward », socialista skota ĵurnalo, du anglaj artikoloj inspiritaj de « Tra la Mondo »: unu resumanta la 3 rimarkindajn artikolojn pri Gurujo; alia rimarkiganta, ke « In view of the recent Education Bill fiasco, a special interest attaches to an article appearing in the December number of *Tra la Mondo* » de Sinjoro C. Steenbuch (Japanujo), pri la vivo en knabinaj japanaj lernejoj.

Ni havis agrablan surprizon ricevante tiujn artikolojn, kies aŭtoron ni ne konas. Ili pravas ke, pro ĝiaj temvarieco kaj intereso, « Tra la Mondo » liveras sciigojn kaj argumentojn por ĉiuj aferoj. Tiel agente nia gazeto faras, se oni povas diri, *superan propagandon* ĉar ĝi montras -- kaj tio estis ĉiam nia celo -- la praktikan utilecon de nia lingvo.

Niaj legantoj pli grandigu tiun valoron, multobligante artikolojn similajn al la brazila kaj skotaj ĵus aluditaj.

Ni rememorigas ke oni povas represi aŭ traduki niajn artikolojn, se speciala malpermeso ne estas farita, kondiĉe ke oni citu la devenon.

— Nia fervora samideano G. Mönster estis sciiginta nin, antaŭ ne longe, pri klopodoj farataj en Kopenhavn (Kopenhago-Danujo) al fondo de Dana propaganda organo. La afero prosperis kaj ni ricevis la unuan numeron de « Esperanto Bladet Helpa Lingvo », kiu aperos kun la konstanta kunlaborado de S^o Fr. Skeel-Görlling, la tre konata aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj danaj-Esperantaj, ano de la « Lingva Komitato ».

« Helpa Lingvo », eldonata de « Societo de esperantistoj en Kopenhago » donis al si 3 bonegajn taskojn:

- 1^o Instrui la publikon pri la lingvo Esperanto;
- 2^o Atentigi la publikon pri la eksterlanda kaj interlanda propagando;
- 3^o Vidigi la praktikajn celojn kaj rezultatojn jam gajnitajn.

Ni ne dubas ke tiu plano, zorge plenumata, progresigos multe nian aferon en Danujo, kie ni havas tiel sindonaĵn samideanojn.

« La kaprino de S^o Seguin », la ĉarma rakonteto el « La leteroj de mia muelejo » de Alphonse Daudet, bonege tradukita de S^o Ad. Yersin, tre fervora samideano, kiu sciis lasi, en sia tre bona traduko, la tutan delikatecon de l' originalo. Tute taŭga por la esp. grupoj kaj kursoj. (Ĉe S^o Ad. Yersin, Peseux (Neuchâtel) Svisujo. 1 ekz., 15 cent 12 ekz., 1 fr. 50; 100 ekz. 11 fr.)

A. M.



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. — 11 fr. 50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4 fr. ĉiu botelo prenita en S^t Etienne, impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo:

J. B. Brunon-Chauvet

S^t Etienne (France).

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senprezare deĉifri kaj legi ĉion esperante skribitan » Enmetebraj en leteron sen pliigo de la poŝtkosto

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, itala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

LA MIÉLINE GELSON

MIRINDA RIMEDO KONTRAŭ

La falo de l' Haroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe

FERRÉ, BLOTTIÈRE & C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ PROPAGANDAJ.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« TRA LA MONDO »

La serio (6 kartoj), afr.: 0 fr. 40 c.

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.

Pageblaj poŝtmarke aŭ monopapere.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR
118, Rue d'Assas, PARIS.

NOVA REVUO DE FOTOGRAFADO

Foto-Revuo Internacia

ĈEFREDAKTORO: CH. VERAX.

— Teksto franca kaj Esperanta. —

La Foto Revuo Internacia n'est pas la traduction en Esperanto de la Photo-Revue; c'est une revue indépendante dont les articles sont originaux ou puisés dans les meilleures revues du monde entier.

ABONO: Jare: 5 fr. por ĉiuj landoj.

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

Viskio Esperanto

Registered trade mark No 270,042. Marque déposée No 13,195. Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŝiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & Co

GARTHLAND STREET,
GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

Ĉampanvino "Mirinda"

1 fr. 75 kaj 3 fr. 50 ĉiu botelo
por 12 boteloj, minimume, enpakitaj en keston.

Ĉe S^{ro} Ch. JADEAU, MERCUREY (S. & L.) France.

SE

vi konas malfacile spiranton (astmemulon), vi faros al li servon konigante la « Remède d'Abyssinie Exhibard » (Abisinia kuracilo EKSIBAR), pudre, cigarede, aŭ je formo de folioj por fumi kvazaŭ tabakon en la pipo. Tiu kuracilo, *ordonata de ĉiuj kuracistoj*, sensuferigas kaj resanigas milojn da malsanuloj ĉiujare. Sin turni al

Sinjoroj H. Ferré, Blottière et C^{ie},
102, rue de Richelieu, PARIS.

L'Internacia Signo

estas la « **VERDA STELO** » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emilo Gasse, 105, rue du Lycée, Le Havre (France).

MILKA
VELMA
NOISETTINE

Suchard

LA BONGUSTEGAJ
ĈOKOLADOJ
POR MANMANĜI.

Verkoj de Dr^o Noel. Ĉe S^{ro} Buygnier, libraro,
rue St Georges, 13, Nancy (Francujo).
Ester', triakta tragedio, de Racine . . . 1 fr. 25
Athali', kvinakta tragedio, de Racine . . . 1 fr. 50
Rudens', kvinakta komedio de Plaŭtus . . . 1 fr. 50
Plutos', komedio, de Aristophanes' . . . 1 fr. 25

NASKIĜINTAJ REVUOJ.

Aperis, dum Januaro, la unua n^o de « The American Esperanto Journal », organo oficiala de la Amerika Esperantista Asocio kaj de la plimulto el la lokaj grupoj jam ekzistantaj en Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko.

La naskiĝo de nova propagandilo en Ameriko estas pleje atentinda kaj ĝojiga. Efektive tiel longe kiel tiu granda Stataro restis indiferenta pri Esperanto, ni povis dubi pri ĝia definitiva sukceso, ĉar alilanduloj ne volis kredi al la estonto de entrepreno flanklasita de homoj tiel agemaj kaj progresemaj kiel Amerikanoj.

Nun oni ne plu povas kontraŭstarigi tian argumenton; kaj la legado de l' unua numero de *The American Esperanto Journal* montras kiom, jam, Esperanto havas bonegajn apogpunktojn en U. S. de A.

La plano de la gazeto estas bonega; kaj tiu ĉi estos samtempe potenca propagandilo en Ameriko, utila fonto el sciigoj pri la movado esperantista en tiu lando; fine ŝatinda kolekto de amerikaj prozaĵoj.

Kore ni salutas nian transoceanan kunfraton, kies monatan alvenon ni ĉiam atendas senpacience.

Ankoraŭ pruvon de progresoj de Esperanto en ia punkto de l' tera globo donas al ni la fondo de « Casopis Českých Esperantistu », bohema propagandilo pri kiu ni parolis en nia lasta numero. Inter la Esperantaj artikoloj estas speciale citinda historia artikolo pri la disvastiĝo de Esperanto en Bohemujo.

Ankaŭ tre pripensinda estas artikolo de S^{ro} V. Riegel, kiu pritaktas la konsekvencojn de la Esperanta disvastiĝo por la diskonigo, ekstere, de sia patrujo.

Ĉiuj landoj, la grandaj kiel la malgrandaj — sed certe precipe tiuj ĉi — gajnos per la progresoj de Esperanto, kaj estas grava eraro kontraŭbatali nin je la nomo de l' patriotismo (patrujismo). Tion tre bone komprenas niaj bohemiaj amikoj; kaj altirante la atenton de siaj samlandanoj pri tiu vidpunkto, certe ili venkos multe da malamikecoj.

Al ili, niajn plej korajn dezirojn.

En Rusujo la movado malfacile progresadas pro la nuna politika stato: ekz. S^{ro} Boris Kotzin skribas al ni, petante ke ni ĝin konigu, ke li estas observata de la polico; oni konfiskis artikolon pri la dispelo de Regna Dumo, speciale verkita por « Tra la Mondo ». « En nia lando, li aldonas, estas praktikata la travidado de la korespondadoj! »

Tamen iom post iom oni indiferentigas pri okazantaĵoj kiuj, momente, haltigis la vivon; kaj denove la gazetoj okupas sin pri nia afero, kiun pritraktis preskaŭ ekskluzive, la pasintan jaron, nia interesa rusa kunfrato « Ruslanda Esperantisto. »

Pro la vasteco de Ruslando, estas dezirinde ke nia kara afero prosperu en ĝi. Por tiuj, kiuj dezirus helpi la rusan propagandilon, ni disdonas, per tiu numero, folion enhavantan sciigojn pri ĝi! Ni rememorigas ke « Ruslanda Esperantisto. » presis, dum 1906, korpemantran tradukon de l' fama *Ruĝa Rido* de Leonid. Andrejev.

Ni transdonos plezure abonojn al la gazeto.

Ni havis ofte okazon paroli pri nia bonega konfrato « Germana Esperantisto ». De kiam ĝi estas oficiala organo de « Germana Esperantista Societo » ĝia germana kroniko plivastigis malpligrandigante la lokon dediĉeblan por la literatura fako.

Por ĉesigi tiun bedaŭrindan staton, la gazeto enhavas, de la januara numero, kvarpaĝan aldonon: « Liberaj Horoj », kiu, presata germane kaj Esperante, estas ankaŭ bonega propagandilo, ĉar ĝi taŭgos kiel aldonon por la gazetoj germanaj enhavantaj regulan Esperantan rubrikon. Rapide plimultiĝu la nombro de Germanoj kapablaj legi la Esperantan parton de « Liberaj Horoj ». Tion meritas la senĉesa agado kaj bonegeco de « Germana Esperantisto ».

Aperis la unua n^o de « Socia Revuo » jam ĉi tie anoncita:

La gazeto celas esti:

« 1^e *Rimedo* por interkunigi la socialistojn kaj liberecanojn esperantistajn diverslandajn per interŝanĝo de ideoj teoriaj kaj praktikaj.

« 2^e *Informa folio* rilate al internacia socia movado ĉu politika, ĉu ekonomia.

« 3^e *Organo batalema* starigota kontraŭ ĉiuj potencaĵoj kiuj subpremas la homan rason, kaj permesas la ekspluatadon de homoj per homoj.

« Petas la helpon de ĉiuj ruĝuloj sen distingeco de titoloj: socialistoj, anarĥiistoj, liberecanoj, liberpensantoj.

« Alprenas, ke la gazeto akceptos la teoriajn disputojn, tamen en la limo de la loko disponebla, kaj observigas ke la parto *disputada* estas morale akceptata kiel malpli urĝa ol la parto *informada*.

« Petas ĉiujn kamaradojn, ke ili diskonigu per propagando tiun ĉi ĵurnaleton, liberigan tribunon por la defendo de la homaj rajtoj.

« Kaj fine ekvektigas ĉiujn liberajn konsciencojn per la alvoko:

« Socialistaj kaj liberecanaj esperantistoj ekstaru! Agadi estas vivi! Antaŭen por la libereco! »

Agadi estas vivi! ja, devas esti nia plej ŝatata sentenco. Laŭ ĝi devas agi tiuj, kiuj aprobas tiun programon, kaj ankaŭ la aliaj, kiuj timus ĝian efektivigon.

Ŝajnas al ni, ke la duaj ne devos deteni sin ekkoni kaj konadi » Internacian Socian Revuon »: ne flanklasante malamikon oni kontraŭbatalas ĝin. Cetere en ĉiuj programoj kaj agadoj estas punktoj, pri kiuj homoj el tre malsamaj partioj povas interkonsenti.

Ekzemple multe el ni opinias ke la milito, kun ĝiaj pligravigaj rimedoj estas vera bedaŭrindaĵo; sed multaj ankaŭ neniam akceptos la teorion elskribitan en la artikolo « Nia paciga agadmaniero » de la 4^a rondiranta folio por « Socia Revuo », kiu sekvas la « fundamentan deklaron », t. e., ke « oni devos kruci stajn brakojn », se milito okazos, « rifuzante preni armilojn por militi ».

Flanklasante tiun punkton, kaj diskuton kiu ne estas en la programo de nia informada revuo, ni aldonos ke « Internacia Socia Revuo », havas jam kunlaborantojn en multaj landoj, inter kiuj multaj desegnistoj, iuj tre famaj: Hermann-Paul, Roubille, Grandjouan, Steinlein, A. Willette. Ludovic Rodo, konata de la legantoj de « Esperanta Studento », estas ankaŭ en la nomaro.

Sur la kovrilo kuŝas alegorio de A. Willette, la talenta franca desegnistino.

Ni deziras sukceson al nia estonta kunfrato, kies regula apero estos nova kaj grava progreso de nia afero.

T. I. M.

NIA PROJEKTITA VENONTA NUMERO.

Nia internacia enketo pri edukado. — Bulgara edziĝo, de L^{to} *Silvestriev* (Bulgaraĵo). — Tertremo (Fino). — Milita ekzekuto en Blida (Algerio), de *Rigour*. — Rio de Janeiro, de E. *Bachkeuser* (Brazilujo). — La Stabat' de Rossini, de E. *Bacquet* (Francujo). — Aprila fabelo, de P^{ro} *Bord*. — Tra Mez-Afriko, eltraĵoj, de K^{to} *Lemaire* (Belgujo). — Scienca kroniko, de *Marcel Finot*. — Kristnaska rakonto por blinduloj, de V. *Riegel* (Bohemujo), k. a.

MIKSAĴOJ.

POR LA PROPAGANDO.

La muska papero — Oni el'pens'is antaŭ kelk'a'j jar'o'j, en Sved'uj'o la musk'a'n paper'o'n. Per blank'a musk'o oni fabrik'as ne nur skrib'paper'o'n sed ankaŭ tabul'o'jn je 12 centimetr'o'j proksim'um'e da dik'ec'o. Tiu'j last'a'j hav'as fortik'ec'o'n kiel lign'o kaj bon'ricev'as la lak'o'jn ĉiu spec'a'jn, kio ig'as ili'n tut'e taŭg'a'j por far'i arĥitektur'a'jn ornam'a'j'o'jn, mebl'o'jn, pord'o'jn, fenestr'o'jn, fenestr'a'jn lum'ŝirm'il'o'jn, flor'pot'o'jn, rad'o'jn por vagon'ar'o'j; eĉ oni konstru'is per tiu nov'a ŝtof'o tuta'jn farm'o'jn. En « Breslaŭ », oni fabrik'is per tiu paper'o forn'o'jn, ban'kuv'o'jn kaj il'o'jn, por kuir'ej'o, de nun ne plu tim'ant'a'jn la mal'lert'ec'o'n de la kuir'ist'in'o'j.

(Berliner Tageblatte)

Tradukis 7068.

Proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesiĝi je Esperanto, donante samtempe la gepatralingvan « Šlosilon » de Ĉefeĉ.

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj problemoj proponataj kaj solvoj, amuzaĵoj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo « Miksaĵoj » La personoj kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.

2^e Krom esceptoj speciale dirotaj la solvoj devas esti sendataj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3^e Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.


4^e Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponatajn problemojn.

PREMIARO DE LA II^a KVARONJARO.

Al la unua gajninto	50	poŝtkartoj.
Al la dua »	30	»
Al la tria »	20	»
Al la kvara »	15	»

 SrojWarden kaj Letenneur gajnantoj de la 3a k. 4a klasigoj kvaronjaraj 1905aj gajnis 5 frankojn mone. Ili petis la redakcion uzi tiun monon por la blinduloj. Tio estas farita kaj dankon al ili pro ilia malavereco.

III^a KVARONJARO.

PROBLEMO XIII^a (DE QUERTAUT).

Besto mi estas, aldonu al mi literon, mi fariĝas artikolo, aldonu ree al mi literon mi fariĝas frukto.

PROBLEMO XIV^a (DE LA SAMA).

Utila arbo mi estas, ŝanĝu unu el miaj literoj mi fariĝas beleta floro; tiam ŝanĝu unu el miaj literoj semo mi fariĝas.

PROBLEMO XV^a (DE LA SAMA).

Mi estas legomo, ŝanĝu unu el miaj literoj frukto mi fariĝas, aldonu tiam al mi literon spicaĵo mi fariĝas.

PROBLEMO XVI^a (DE NAZUMULO).

Anstataŭigu ĉiujn punktojn per literoj kaj vi legos frazon konatan.

. . A . A . O . . O . S . E . A . . O . E . A . . I . J . .
O . A . J . J . . . I . A . I . I . A . . A . O . E . . A . J .
I . T . E . R . I . A O . I . A . . A . I . . A . . E
. . . O . O . . . U . N . E . . . O . P . O . A . . . A . A Ŭ I
. E . . U . . O . O . A . P . A . O . A . A . . A . . A . A
. A . O . . . I . U . J . I . . I . A . S . O . A . O .

PROBLEMO XVII^a (DE LA SAMA)

- . . . mezuro
- . . . narkolito
- . . . meblo

PROBLEMO XVIII^a



El Lusthof.

Kie estas la ĉasoŝtelisto ?

Rimarko: Por tiu ĉi problemo sendi nur montraĵon. Tiamaniere oni ne difektos la ĵurnalon.

PROBLEMO XIX^a (DE K. K. RI. K)

Kio manĝas kion neniam vi manĝos ?

PROBLEMO XX^a (DE LA SAMA)

Mi estas ujo; el ĝi eligu literon vi vidos laboriston.

Rimarko: la solvoj de tiuj problemoj estos akceptataj ĝis la 28^a de marto 1907.

A « — Via peto estos senutila, ĉar la administracio ne respondas pri l' abonaj numeroj perditaj.

B — « Sed mi ne diras, ĉu ĝi estas bona aŭ malbona !

A — « ??? !

Roksano.

Esperantistaj konsuloj.

Kiel ni jam diris, « Esperanto-Ĵurnalo », kiu ĵus reaparis, estos la organo de la konsuloj. Ni do ne plu enpresos la planan nomaron de l' konsulejoj kaj oficejoj.

Ni diru nur, ke ili kontentige disvastigas: Ĵus ni ricevas de S^{ro} Rjjuĉkov sciigon pri fondo de « Esperanto-Ofico » en Transkaŭkazo (Rusujo-Elisavetpol), kio pruvas la ĝeneralecon, t. e. utilecon, de tiuj institucioj.

Pro tio nia agema amiko S^{ro} Sam Meyer, dissendis cirkuleron al ĉiuj esperantistaj konsuloj konataj de li, celantan krei inter ili interŝanĝon de komunikoj pri la sperto akirita. Raporto verkita de S^{ro} Sam. Meyer utilis kiel fundamento por pridisputado en Cambridge, de la ĉeestantaj konsuloj.

La konsuloj, kiuj ne ricevis la cirkuleron, bonvolu konigi sin. Sufiĉos se ili sendos vizitkarteton kun sia adreso al S^{ro} Sam. Meyer, esp. konsulo en La Rocheffe (Francujo).

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Eho Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^o H. Brühl, Unter den Linden 47 III, Berlin, Deutschland. Jare, 2 markoj.

Eksport Ĵurnalo. — Internacia Revuo por komerco, Industrio kaj Tekniko. — Jare 5 fr. (3 markoj Germanuje). — Ĉe Esperanto Verlags-Anstalt Emil Schnell, G. m. b. H. Frankfurt a. M. Germanujo.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille a sistemo. 3 f. — Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Esperanto. Duonmonata Internacia Gazeto. Tutmonda informilo. Diversnaciaj eldonoj; ĉiulandaj korespondantoj. Praktitaj informoj. Novaĵoj el la tuta mondo. Organo de la konsuloj kaj peresperantaj societoj. Aperas en ĵurnala formato. *La plej malkara! la plej ofia!* Jarabono: 3 frankoj. Unu numero: 10 centimoj. Direkcio: 8, rue Bovy-Lysberg, Genève, Svisujo. La unua numero aperis en Februaro. Oni nepre legu ĝin. Premioj al la legantoj.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu N^o afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Foto-Revuo Internacia. — Ĉiumonata resume de Photo-Revue. Jara abono, 5 fr. 1 Numero aparte, 50 cent. Ĉe la « Librairie photographique » Charles Mendel, 118 Rue d'Assas, Paris.

Idealo. — Organo de « Sicilia Federacio Esperanta ». Italuje, 2 fr. alilande, 3 fr. Corso Catalani, 495 Palermo (Italujo).

Juna Esperantisto. — Tute Esperante. Divastigo de Esperanto ĉe la ĵunularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boul^d St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

Lingvo Internacia. — Monata Esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komencigo de ĉiu monato.

Socia internacia Revuo. — Internacia redaktata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e (France).

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

The American Esperanto Journal. — Oficiala organo monata de la « American Association ». Angle kaj Esperante. Propagando kaj literaturo — Jare 5 fr. Boulevard station, Boston, Mass. (U. S. A.)

Amerika Esperantisto. — Gazeto por la Lingvo Esperanto en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, angle kaj Esperante. Bele presata. Jara abono: 1 dolaro. Adreso: L'America Esperantisto, Oklahoma City, U. S. A.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco. Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. jare. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique). La abono komencas nepre la 1an de Septembro.

The British Esperantist. — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 20 paĝoj da novaĵoj, k. e., anglo-Esperante, kaj da literaturo tute en Esperanto. Jare 4 fr. — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Ĉasopis Českých Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. — Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo náměstí.

Centrameriko Esperantista. — Hispane kaj Esperante. F. R. G. Abril, 8a Avenida Sur 11, Canton Libertad, Guatemala, Ameriko.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

Esperanto. — Hungare kaj Esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^o Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungariujo).

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate) Redaktata germane kaj Esperante. JARABONO, 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

Helpa Lingvo. — Dane kaj Esperante. Abono 1,20 kron. Admin. ĉe F^{ino} G. Münster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago O., Danujo.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, — kun ilustraĵoj. Jarabono 2 fr. 60 — N^o 1a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Pioniro. — Ĵurnalo Esperanta India. Eldonata de la Kolar Gold Field Esperanto Club. Monata abono: kvar pencoj. Red. kaj Adm.: Hon^a Sek^o de la klubo esperantista de la K. G. F. Marikuppam, Mysore State, South India.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: Ruslando, *St Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, al 1a S^{to} « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Le Cycliste. — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D^{ro}: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Étienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. — Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun meĥanismo por ŝangi la rapidumojn kaj pri higienaj ciklistoj.

De Lushof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj. Jara abono: 2 frankoj.

Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

Nekomercaj anoncetoj.

1 fr. 25 po 4 linioj 33-literaj. Ĉiu plua linio: 25.

25. Mi sendos cent malsimilajn poŝtmarkojn el francaj kaj neerlandaj kolonioj al tiuj, kiuj sendos al mi cent malsimilajn poŝtmarkojn el anglaj kolonioj, prefere malnovajn. Fize, au Pastissou à Béziers, France.

30. S^{ro} P. P. Melnikov, Gospitalnaja ul., d. smirnova, Kazan, Ruslando, deziras korespondi per ilustr. p-kartoj kun ĉiulandaj geesperantistoj kaj ĉiam tuj respondos.

31. Ĉiuj studentoj aprobantaj ideon pri ia fondo de *Tutmonda Studenta-esperantista grupo* estas petataj sendi sian aprobon por ricevi pli detalajn sciigojn, laŭ la sekvanta adreso: St. Petersburgo. Bolš Podjaĉeskaja 24, S^{to} « Espero », al S^{ro} R. Sakovič. Por respondo, oni bonvolu aldoni, se eble, poŝtmarkon.

32. L. de Guesnet, sporta redaktoro de « Tra la Mondo » verkanto de la Kroniko en Esperanto de *tous les sports*, organo oficiala de la unuigo de la societoj francaj de sportaj atletaj, petas helpon de ĉiuj sportuloj por traduko de la sportaj esprimoj, 9, R. Chauveau-Lagarde, Chartres, France.

33. S^o J. H. Salomon, fondinto de K. K. K. (korektada korespondanta klubo) loĝas nun je la jena adreso: 17, Penywern Road, Earls Court, London S. W. (Anglujo). Oni petu al li sciigojn pri la tre sukcesa klubo.

34. S^{ro} J. Pion, Société générale Beaune, France, deziras aĉeti la Majan Numeron (1906) de « Tra la Mondo ».

Malgranda korespondado.

S^o Julio Lizana Gal (*Bilbao*). — Via abono finiĝos kun 1907.

R. Frenkel (*Siberujo*). — Koran dankon pro via interesa nova sendo kun ĉarma ilustraĵo.

E. Bacquet (*Francujo*). — Estus tro malsimpla afero, por mi, okupiĝi pri la efektiveco de via projekto.

Societo « Espero Kataluna » en Barcelona eldonis « Esperantan Almanakon » por 1907 tre praktikan kaj taŭgan por la propagando en Katalunujo ĉar, malsupre de ĉiu monata folio kuŝas, katalane, mallongaj klarigoj pri Esperanto.

Bonegan ideon havis nia elpensema amiko Ĉefeĉ aldonante al sia dekcentima broŝuro « Lingvo Esperanto lernebla per malgranda historio » folieton speciale difinitan por la grupoj, kun spaco rezervita por stampo. Bonege.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant. — A. J. WITTEYCK, Presisto, Bruĝo.